



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aprilo 2019 n-ro: 40



Merhaba,

Bu yılın 3. sayısına vardık bile.

Mart ayı dergimizde size 30'dan fazla metin hazırladık. Bunlardan özellikle ilginç olanlardan bazılarını sizler için seçtik:

- * Mühürlenmiş Zaman
- * Esperanto edebiyatı tarihinden resimler
- * Rujuk'ların ülkesinde (MAS'on edebiyat sayfalarından)
- (bu son ikisi seri yazı olacak gibi görünüyorlar)
- * İhanet (Ivanička Mağarova'nın mizahi hikayesi)
- * Sadakat (Julian Modest'in bir hikayesi)
- * Kır Çiçekleri (bir hikaye)

ve daha birbirinden ilginç yazılar, haberler, şiirler, seri yazılar, fıkralar, bilmeceler vs

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

Ni jam atingis la 3-an numeron de ĉi tiu jaro.


En nia marta revuo ni preparis por vi pli ol 30 tekstojn. El tiuj ni elektis por vi kelkajn, kiuj estas precipe interesaj:

- * Tempo Sigelita
- * Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo
- * En la lando de Rujukoj (el la literaturaj paĝoj de MAS)
- (ŝajnas, ke tiuj du fariĝos seriaj teksto)
- * Perfido (amuza rakonto de Ivanička Mağarova)
- * Fideleco (rakonto de Julian Modest)
- * Kampaj Floroj (rakonto)

kaj multaj aliaj tre interesaj teksto, novaĵoj, poemoj, seriaj teksto, ŝercoj, krucvortenigmoj ktp.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
"ESF-Historio": kunlaborantoj serĉataj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Kien Malaperis la Unua Libro	4
Tempo Sigelita	5
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	6
Poemo po sekvo	7
Perfido	7
DEMETERA kaj PERSEFONA (ΔΗΜΗΤΗΡ και ΠΕΡΣΕΦΟΝΗ)	8
Fideleco	11
La vendo de la kruco	12
Donaco	13
Kakto kaj Lacerto	13
La kato kaj la kokino	14
Mallonga Historio de Filozofio (39)	15
Romano en minimumo	16
Poemoj de Klara Ilutoviĉ el Rusujo	17
Aŭtuna fabelo	17
En la lando de Rujukoj - de Henriko Bolo	18
Esperanto - Nemateria Kultura Heredaĵo - En Kroatio	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 11)	21
Rano kaj Bovo	22
El la libro de "Dao de Jing" (31)	22
Moderna Banurbeto	23
La Akuzativo	24
Stagnanta japana nuklea politiko	25
Kampaj Floroj	27
Esperanto, Interreto, Homa varmo	29
Mia amo al pola gepatra lingvo	29
Nova Jaro	30
Ni Lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

"ESF-Historio": kunlaborantoj serĉataj



Por lingva justeco en multkultura mondo
For linguistic justice in a multicultural world
ekde 1968 | since 1968

"ESF-Historio": kunlaborantoj serĉataj

Antaŭ pli ol kvindek jaroj, en 1968, ESF estis fondita kiel eduka kaj esplora neprofitcela fondaĵo. Ekde tiu tempo, ĝi estas grava subvencianto de universitataj esploroj kaj diversaj projektoj rilataj al Esperanto, lingvistiko / interlingvistiko kaj lingva justeco ne nur en Nordameriko, sed en la tuta mondo. La tri fondintoj, junaj tiutempe, daŭre kunlaboras kun ESF kiel konsilantoj aŭ estraranoj.

Tra la jaroj la administrado de la fondaĵo spertis multajn ŝanĝiĝojn. Dumtempe, pluraj dokumentoj estas perditaj aŭ disigitaj, esploristoj kaj estroj de projektoj en pluraj kazoj ne plu vivas, kaj estas klara risko ke valora informo pri la historio de la fondaĵo malaperos se ni ne rapide agos.

Sekve, la estraro pretas financi modestan projekton por konservi la skribitan historion kaj kolekti la memorojn de partoprenantoj en la agadoj de ESF, kiu eble gvidos al la eldono de publikaĵo pri la historio de la unuaj 50 jaroj de ESF. Tial ESF serĉas personon de Usono aŭ Kanado, kiu pretas gvidi aŭ partopreni en tiu ĉi projekto. Se vi interesiĝas, bv. kontakti la Ĉef-Direktoron, Chuck Mays <chuck.mays@esperantic.org> antaŭ la 30a de aprilo 2019.

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 57-a sumoo komenciĝis la 17-a de marto dimanĉe, kaj daŭris 15 tagoj ĝis la 31-a de marto.

Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ricevis la rezulton, do ilin ni publikigos en la venonta numero de nia revuo.

Ni pensas ke estas sufiĉe granda nombro da partoprenantoj. Sed tion ni malkovros kiam ni ricevos la statistikojn.

Jen la diversaj rangoj de la luktantoj:

Rango A: perfektaj venkintoj en la lasta sumoo

Rango B: malvenkintoj en la lasta sumoo kaj re-vekiĝintoj.

Rango C: Novaj partoprenantoj

Estas ankaŭ tri grupoj da luktantoj. La grupo de **Chaux-de-Fonds, NEK** kaj **Ĵakuecu**


Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>
Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



UEA



N-ro 784 (2019-02-28)
Aperis la Dua Bulteno kun servoj (loĝado, ekskursoj, bankedo) por la 104-

a UK, Lahtio 2019

UEA ĝojas informi, ke la Dua Bulteno kun proponoj de servoj por la 104-a Universala Kongreso en Lahtio jam estas legebla en la UK-retejo [...]

N-ro 785 (2019-03-08)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago, 8 marto 2019

Universala Esperanto-Asocio salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la Esperanto-komunumo, okaze de la Internacia Virina Tago 2019. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo [...]

N-ro 786 (2019-03-09)

UEA serĉas novan prezidanton

En julio 2019 okazos elektoj por la nova Estraro de UEA por la periodo 2019-2022.

Tial ke la prezidanta posteno estas kerna en la funkciado de organizo kaj la elekto de prezidanto povas forte influi la engaĝiĝemon de aliaj aktivuloj al la Estraro [...]

N-ro 787 (2019-03-17)

UEA inaŭguras ĉe la reta Revuo Esperanto rubrikon pri Monda Kulturo: partoprenu!

Kadre de la laboroj pri sia fako Kulturo, Estrarano de UEA Fernando Maia Jr., kunlabore kun la tuta Estraro kaj la redaktoroj Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, inaŭguris novan rubrikon en la reta Revuo Esperanto, sub la titolo Monda Kulturo. [...]

TEJO



Voĉdono por Komitatanoj B dum marto-aprilo 2019

Komenciĝis la voĉdono por Komitatanoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn. La kandidatoj estas, ĉi tie listigite en alfabeto ordo laŭ la persona nomo [...]

Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2019-2020)

Kadre de la Eŭropa Volontula Servo, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la [...]

Novaĵoj pri IJK 2019 en Slovakio

La preparado de IJK 2019 en Slovakio progresas kaj la Loka Kongresa Komitato rivelis kelkajn detalojn pri la bunta programo. Kiel jam anoncite [...]

La gajnintoj de la konkurso Partoprenu IJK-n 2019

Ni ĝojas anonci la gajnintojn de la konkurso "Partoprenu IJK-n" 2019: Charlotte Burton el Usono Emerson dos Santos el Brazilo Ekaterina Lozina [...]

Partoprenu UNITED-Konferencon en Albanio nome de TEJO!

TEJO membras en la tuteŭropa reto UNITED, kiu kunigas ĉ. 560 volontulajn organizojn rilate al kontraŭ-rasisma kaj kontraŭ-faŝisma agado, [...]

Centra Reto – La sistemo de TEJO por interna kunlaboro
Centra Reto estas la ĉefa sistemo de TEJO por interna kunlaboro kaj ĝi estis lanĉita komence de la nova jaro 2019. [...]



Leteroj de niaj legantoj



Estimata,
Mi bonorde ricevis vian interesan gazeton.
Kiel jam dirite, ĝi pli similias al revuo ol al
simpla gazeto. Gratulojn.

Mi decidis sendi al vi unu el miaj antaŭnelonge verkitaj
poemoj. Bondezirojn al vi kaj al via administrado.

Carmel Mallia, el Malto




Mi tute ne konsentas nomi 32-paĝan revuon
"revueto". Tiam devus honti ĉiuj revuoj
nomantaj sin "revuo" kaj ne havantaj 100
paĝojn. Dankon por la aperigo de informo
pri IIK.

Berto Ŝuman el Francio

Kien malaperis la Unua Libro

-- el Libera Folio

Kion necesas fari por denove inspiri multajn
homojn lerni Esperanton, demandas Jolanta
van Holstein. En 1887 ne ekzistis interreto,
tamen la ideo sukcese disvastiĝadis. Ĉu venis
tempo reeldoni kaj traduki en ĉiujn naciajn lingvojn la
Unuan Libron?




Antaŭ 131 jaroj, en 1887, kiam Ludoviko Zamenhof
eldonis sian Unuan Libron kun la ideo pri Internacia
Lingvo, ne ekzistis interreto, ne ekzistis apoj kiel
Duolingo, programoj por lerni la lingvon ... nek io ajn
komparebla kun la nuntempaj teknikaĵoj, kiu faciligus
la disvastigon de la lingvoprojekto de Zamenhof.

Tamen la ideo disvastiĝadis tra la tuta mondo ...
Zamenhof sendis per simpla, tradicia poŝto la libron al
diversaj homoj por ke ili legu ĝin, pripensu la aferon
kaj subtenu lin por realigi lian revon. La libro enhavis i.
a. klarigojn de la aŭtoro pri lia ideo kaj pri la lingvo
mem, la 16 regulojn de la lingvo, kelkajn tradukojn en
tiu Lingvo Internacia, simple por montri ke ĝi funkcias,
ke oni povas esprimi ĉion en ĝi kaj traduki al ĝi ĉiujn
verkojn. Kaj la libro enhavis ankaŭ kuponojn, kiun li
petis resendi al li kiel deklaron ke oni volas lerni la
lingvon, kaj ke oni lernos ĝin, se 10 milionoj da homoj
deklaros la samon. Kaj jen: la homoj legis la libron kaj
reagis.

La unua kiu kontaktis L. Zamenhof estis Antoni
Grabowski. Jam en la jaro 1887 Grabowski aĉetis kaj
trastudis la freŝe aperintan libreton "Dr-o Esperanto.
Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro",
en kiu L. L. Zamenhof prezentis sian lingvoprojekton.
Forte impresita de ties travidebla strukturo kaj surprize
rapide akirebla esprimkapablo, Grabowski vojaĝis al

Varsovio kaj vizitis Zamenhof; en tiu
tago okazis inter ili la unua buŝa dialogo
en Esperanto. Poste Grabowski per siaj
tradukoj tre grave influis la evoluon de
la Esperanta literatura lingvo. La
elpoligo de la epopeo "Sinjoro Tadeo"
de Adam Mickiewicz fare de Grabowski apartenas al
la plej brilaj tradukoj al Esperanto, iam ajn aperintaj.



Nuntempe ekzistas multege da kursoj, lernolibroj,
lerniloj kaj apoj por alproprigi Esperanton. Sed kie
estas tiuj esperantistoj kiuj ellernas Esperanton bone?
Kiuj faras tion je la nivelo de la unuaj esperantistoj?
Kial oni forgesis la Unuan Libron? Mi volontege lanĉus
la ideon eldoni la Unuan Libron en ĉiuj lingvoj, ĉar la
Unua Libro, enhavanta la klarigojn de Zamenhof, liajn
emocian peton kaj instigon atenti lian verkon, kaj
ankaŭ la bazajn principojn, estas la plej bona
lernolibro de Esperanto iam ajn eldonita.

En la Unua Libro mi trovis ne nur respondojn al la
demando "kial lerni Esperanton", sed mi trovas en ĝi
ankaŭ inspiriĝon por mia Esperanto-agado. Zamenhof
metis en la Unuan Libron ne nur raciajn klarigojn pri
sia lingvo internacia, sed ankaŭ ĉiujn siajn emociojn,
kiuj profunde tuŝas min ĉiufoje denove kiam mi
relegas la libron. La Unua Libro enhavas ĉiujn
argumentojn kaj pledojn por Esperanto. Mi opinias, ke
oni ne bezonas elpensi kaj presi novajn varbilojn,
sufiĉas traduki al naciaj lingvoj la Unuan Libron kaj
disdoni ĝin. Ĝi estas la plej bona kaj la plej alparoliga
varbilo por Esperanto kiun mi konas. Zamenhof
montris per ĝi sian genion. En 1887 li aplikis
merkataĵon de sia verko sur la nivelo de la 21-a
jarcento. Sur la unua paĝo de la libro videblas la frazo:
"Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia."
Zamenhof humile kaj modeste petas atenton kaj
aktivan helpon de la tuta homaro por sia verko, kiu
kostis al li multe da tempo kaj sano. La celo estas do
tutmondigi la lingvon. Tio estas la tasko de la
Esperanto-movado kaj de ĉiu esperantisto.

verkis **Jolanta van Holstein** el Nederlando

Aprilo kaj festivalo de filmoj

Juna viro. Kiom da deziro li havis por produkti filmon! Kiom da fojoj li iris al la kinejo... Kiom da librojn li legis pri la arto de kino. Li tiam vivis en alia mondo. Ĉiu aprile li sekvis la festivalon pri filmoj kaj kuris de kinejo al kinejo. Ŝajne ia obezeco pri filmoj. Aprilo signifas printempon; printempo signifas amon kaj amoj en la mondo de filmoj... Virinoj en la vestibloj de kinejoj... Kelkaj de ili verkistinoj, aliaj artistinoj, kaj aliaj reklamistinoj... Krom tiuj virinoj en la blanka kurteno, li ankaŭ ŝatis la virinojn en la vestiblo... Li pensis pri la ebleco enamiĝi kun iu de ili. Kaj en sia menso li imagis la eksterordinarajn renkontiĝojn kaj konatiĝojn en la scenoj de la filmoj. Ekzemple, li estis profunde tuŝita pro la enkonduka sceno de filmo kiun li spektis antaŭ multaj jaroj. La posta parto de la filmo estis enuiga sed li ĉiam revis pri konatiĝo, amo kaj amorado same al tiu unua sceno de la filmo. "Nia Rakonto" (Notre histoire - 1984)... filmo kiu ekkomencis en trajno. La virino estis rakontinta al la viro pri iu viro kaj virino, kiuj konatiĝis kaj kiuj poreterne disiĝis post unu nokta afero. La ĉefaktorj estis Alain Delon kaj Nathalie Baye.



Antaŭ multaj jaroj, en Usona filmo, kiun li spektis en televidilo, estis tia sceno: en buso, la pinglo de la mantelo de iu virino krocigis al la pluvmantelo de viro kaj pro tio ili devas elbusiĝi kune. Poste konatiĝo, kaj pli poste amo... Kiuj estis la ĉefaktorj, kiu estis la reĝisoro, en kiu jaro? Neniun de ili li plu memoras. Kino arto estas ankaŭ filmo-kvadratoj kiuj albrociĝas en la menso.

Kino arto ankaŭ instruas kسادon. Varmetaĵoj, ardaj kisoj; ĉiujn oni kopias el la kino kurteno. Se vi estas vira spektanto, la virinoj en la filmoj daŭre ŝanĝiĝas sed vi estas la ĉefaktoro kaj daŭre kisas ilin. Ĉu vi nun komprenas kial la kino arto estas tiom multe ŝatata?

Kompreneble la nura redono de la kino arto ne estas amo... En la filmo oni ankaŭ konatiĝas kun novaj reĝisoroj kaj novaj perceptoj. Ekzemple la filmo

verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkujo

"Ashug-Karibi" (1988 - La malriĉa enamiĝinto) kiun li spektis pli poste. Tiu estis fimo en miniatura gusto de Sergei Parajanov.



Sed pli poste li konstatis, ke la diversaj broŝuroj de la festivalo, la farataj studgrupoj kaj diskutgrupoj; ĉiuj ĉiam kreas mitojn. Mitoj pri la artistoj, mitoj pri la filmoj, mitoj pri la epokoj... Oni komentadas pri la nuntempaj dioj kaj diinoj, ĝuste tiel, kiel faras la teologoj... Kaj la spektantoj, ŝajne la toksomaniuloj, kuradas tien kaj reen, ŝajne kiel la disĉiploj. Kinejoj tiam estis temploj.

Oni skribas, ke la kino-arto kreas sentemon, socialan konscion, estetikan sencon. Sed la simplaj iloj de fratoj Lumiere, de Edisono ktp jam estis for en la pasinteco. Ĉie en la mondo oni produktis milojn da filmoj. Kaj iliaj kopioj, en la formo de bobenoj, KD-oj, videoj ktp, eble faris, ke tiu numero kresku al trilionoj. Kun la interreto ĉio plifaciliĝis kaj preskaŭ la tutaj filmoj de la kino historio kaj de la nuntempo transiĝis al la "cifereca universo". Ĉu ni diru, ke ili enteriĝis? Eble ene de rubujo de bildoj aŭ en ia tombejo de bildoj...

Sed la decidon de fasto li prenis eĉ pli antaŭen de la invento de interreto. Li komencis viziti la festivalon malpli ofte. Li ĉesis la voremon de siaj lernejoj kaj mezaĝaj aĝoj. Tiam li ankaŭ elektis la filmojn spekti, sed iu interna voĉo ĉiam diris al li: "Rigardu! jen ankaŭ alia filmo, kiu eble estas bona! Ne maltrafu ĝin! Enpremiĝu ĝin en tiu sama tago! Estas nur 15 minuta piedirado inter la du kinejoj..." Tiam la kinejoj de la festivalo troviĝis en preskaŭ la sama distrikto – en Istiklal strato de Bejoglu distrikto (en la eŭropa parto de Istanbul). Kaj kelkfoje en Rex kinejo en Kadikoj distrikto (en la azia parto de Istanbul).

Ankoraŭ ne ekzistis retaj portaloj kiel la nuntempaj Netflix, DiziBox ktp. Ĉi tiuj estas ciferecaj platformoj ebligante mult-kanalajn televidelsendojn.

Iom poste tiu kurado, tiu amo de arto fariĝis sensenca por li. Estis geamikoj kiuj kunhavis la saman opiniojn, kaj ankaŭ aliaj kiuj ne aprobis tiun pensadon... Ĉu li dirus ke tiu arto estas sensenca, kaj kino estas pakaĝita "ladskatolo de vivo" la komunumo de la templo lin anatemus, lin akuzus. Aŭ eble nenio okazus. Ĝuste tiel kiel la herooj de Franz Kafka li tion, eble iom troe imagigis en sia menso.

Li multfoje pensadis pri tio: "Kial fikciigi vivon kvankam mi havas la eblecon travivi ĝin?" Ĉu manio al arto ne estas same al toksikomanio?

Li iam spektis la filmon de Martis Scorsese: "Hugo" (2011). Ĉi tiu filmo, kiu estis lirikaĵo al kino arto kaj al Georges Méliès, denove ardigis lian amon al

>> 22

Hendrik Adamson (1891-1946)

Du estonaj poetoj nun okupas mian menson, Hilda Dresen kaj Hendrik Adamson. Liaj verkoj aperis dum la intermilitaj jaroj en revuoj ĝis Stafeto, la fama eldonejo de Régulo Pérez en Kanariaj Insuloj, aperigis ilin libroforme. Pri Hilda Dresen mi verkis artikolon por tiu ĉi serio (Juna amiko, n-ro 117, 2006). La elektitaj poemoj de Hendrik Adamson, sub la titolo Vesperkanto, aperis nur en 1967, 21 jarojn post lia morto, kun antaŭvorta eseo de Hilda Dresen pri li kaj lia verko. Ŝi konis lin bone kaj konsideras lian sorton kun profunda komprenemo. Mi ĉerpas el ŝia eseo kelkajn faktojn:

Hendrik Adamson naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Kärstna, kampara loko en Sud-Estonio. Liaj gepatroj estis malriĉaj. Li elstaris kiel la plej bona lernanto en la loka lernejo kaj poste studis en la Pedagogia Seminario en Tartu. En 1911 li ricevis postenon kiel instruisto en kelkaj kamparaj lernejoj, 1919 -1927 en sia hejmloko en Kärstna. En 1927 li serioze malsaniĝis kaj ricevis malgrandan pension. Dum la militaj jaroj, 1940-1945, li penis labori denove kiel instruisto, sed tio superis liajn fortojn. Sian lastan vivojaron li plejparte pasigis en la lito.

Esperanton li eklernis fine de 1929 kaj jam en 1930 li ekverkis originalajn poemojn en tiu lingvo. Sed multajn jarojn antaŭe li provis sian poetan talenton verkante en sia gepatra lingvo, la estona. Liaj estonlingvaj versaĵoj aperis en gazetoj ekde 1913, lia unua poemaro en 1919. En 1965 estis eldonitaj poemoj elektitaj el liaj ses estonlingvaj poemaroj en la intermilitaj jaroj. Multaj estas verkitaj en lia loka dialekto. Pro tio Hendrik Adamson estas kondiderita aparte meritplena poeto en sia gepatra lingvo.

Hendrik Adamson estas esence melankolia poeto. Tamen, Hilda Dresen, komparante liajn estonlingvajn poemojn kun la esperantaj, diras en sia eseo, ke "oni devas konstati ke en la esperantaj estas troveblaj relative pli multe petolaj kaj ĝojaj sonoj ol en la estonlingvaj." Probable ŝi pravas. Enkonduka poemo anoncas la deziron de la poeto esprimi la tutan gamon de sentoj, kaj ne perdiĝi en negativaj plendoj. Jen la unua kaj lasta strofoj:

Mi ludas sur la kordoj
pri ĝojo kaj malĝoj',
kaj frapas sur la pordoj
apud la fremda voj'.
- - -
Ĉar fajron aŭ fajron

enhavas ĉiu poem',
vi trovos sub literoj
la sparkon por vi mem.

La poeto esprimas la konvinkon, ke liaj poemoj havas valoron, kiun la leganto trovos, ĉiu laŭ sia animstato. Ĉar la poezio de Hendrik Adamson rivelas lian animon en tia simple sincera maniero, ke liaj eldiroj facile trovas aliron al sentema leganto. Ofte lia spirito estas kadrita en cirkonstancoj kiuj elvokas trankvilon, kiel en la poemo Nokte:

Staras betuloj duvice,
susuras en vento vespera,
Floroj odoras delice,
murmuras ondaro rivera.
Nokto sternaĝas kvieta
kun mola vindaĵ' de nebuloj,
en meditado pieta
mi iras, dum flustras betuloj.

Sed pli ofte cirkonstancoj elvokas melankolon kaj senton de soleco randanta malesperon. Tiel en la poemo Krepusko:

Dum gaje lumetas lampiroj
kaj ŝvebas la flora odor',
ĉirkaŭe flugadas vampiroj
kaj suĉas la sangon el kor'.
Pepadas birdet' en arbusto
dum dolĉa vespera langvor',
sed mordas senĉese en brusto
timige – terura angor'.
Aŭdiĝas la vesper-sonorado,
al bronzo puŝiĝas frapil',
resonas ĝi kiel plorado ...
La vivo – inkuba delir'.

Sed la poeto ankaŭ havas pli malpezajn momentojn, ekzemple en la poemeto Hej! li kuraĝigas kaj instigas la homojn al vigla agado per milda ironiemo, dum la vivo daŭras:

Tiklu, tiklu gorĝon rido,
vivi viglu, hej, homido,
kun la korpo, kun la kor',
dum la viv' ne flugis for.
Tiklu, tiklu gorĝon rido,
vivi viglu, hej, homido,
kiel el sunbrulo muŝ',
ĝis la morto diras: huŝ!

Poemo po sekvo

(Tio estis konkurso direktita al francaj lernejoj, la poeto Serge Pey verkis poemkomencon, kaj oni petis al la lernejoj elpensi sekvon. La ideo plaĉis al mi, kaj la komenco inspiris min, do ankaŭ mi verkis (francelingve) finon. Nun mi esperantigas la tuton. La du unuaj strofoj estas de Pey, la tri lastaj de mi.)

Ni enterigis vorton de l'vortaro

Tion diru al la arboj sur la paperojplena postfesta plac'.

Tion diru al la kvar direktoj horizontaj.

Tion diru al lavendaj tolaĵoj.

Tion diru al l'bovin' en poŝtkarto sur muro de l'kuirejo.

Tion diru al viaj malvestintaj vestoj.

Mi forstrekiĝis vorton de la vortaro,

Kaj mi enterigis ĝin kun adreslibreto mia,

Kun ĝiaj aleoj kaj floroj

Kaj ĉiuj hundoj,

ĉar la kiomo de ĝiaj mortintoj

Fariĝintis pli granda ol ĝi mem.

Estas mortintoj pri kiuj mi fieras,

Sed tio revivigos neniun.

sendis Roland Platteau el Francio

Mi forstrekiĝis vorton el la vortaro,
Tiel, kiel socio forstrekiĝis ĝin el la viv'.

Ni entombigis la flirtintajn lavitaĵojn.
Ili eldetruis la domon, kie niaj koroj sangis.

Oni eŭtanaziis la revojn kun l'intestar'
elventrita,

Kaj mortis la vorto tutŝnurligita kaj emfazsonora

Tia, kia olda diplom'

Siajn kurantaj kursivojn kovanta.

Sed, ĝin enterigis mi, amkarese,

Kiel mortintan katon, kiu iam nomiĝis „**Rostpano**“.

Kaj en lito ampleksa mia mi ankoraŭ revas pri ĝi.

Tion diru al la pluveroj,

Tiu tutŝrumpa mizera vorto

Nomiĝis

„Liberec“.

sendis **Roland Platteau** el Francio

Verkita : 25-an de junio 1999

esperantigita : oktobro 2001



Perfido

Mi kaj Pejĉo sidas en noktatrinkejo. Ni sidas kaj rigardas unu la alian amante. Ĉiu pensas pri io sia, bela, iom, iam okazinta kaj neripetebla.

Li etendas sian manon kaj ordigas petoleman tufon en mia hararo. Poste lia mano karesas tenere mian vizaĝon. Mi ekridetas al li enigme kaj kuraĝe. Fermante la okulojn volupte, mi etendas manon por tuŝeti la lian.



verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

La drinkejo estas plenplena. Ĉiuj tabloj estas okupitaj krom unu nura. Sed ne longe al ĝi direktiĝas eleganta, juna viro. Li sidiĝas. Ho, terure! Li rimarkis min.

Mi pli rigardas amante Pejĉon, tamen miaj kruroj tremas. Sed li tenas miajn manojn, kisas ilin tenere kaj flustras amajn vortojn. Malvarma ŝvito aperas sur mia frunto. Mi sentas, sur mia nuko, la frostigantan rigardon de la eleganta viro. La skandalo estas neevitebla. Kun la rapideco de la ruzulino mi ekstaras, por forlasi la noktamuzejon. Sed jam estas malfrue. La viro staras kaj alproksimiĝas al nia tablo. Li levas la manon kaj per unu frapo surplankigas Pejĉon, kiu falas. En la salono ekkuras onidiro de tablo al tablo "Sia edzo kaptis ŝin kun la amato" kaj neniuj supozas, ke mia amato estas la bela, eleganta, juna viro, kiu tiel kruele venĝis pro mia "perfido" kun Pejĉo, mia edzo.

verkis kaj sendis **Ivaniĉka MAĜAROVA**
el Bulgario, Razgrad



Nun estas vintro; estas tute certe, ke poste venos printempo, ke sekvos somero, aŭtuno, poste denove vintro k.s. Ĉio tio ĉi estas ja al ĉiuj homoj konata, tamen, kiel kaj kial tio okazas? kial post vintro nepre venas printempo? Oni diras, ke en nia tempo ĉio estas science esplorita, pruvita, klare eksplikita, do, vaste konata. Tamen, konata al kiuj? mi estas tute certa, ke la plimulto de la ordinaraj homoj nenion komprenas kaj scias pri la diverseco de la temperaturo de la tero laŭ ties rotacio kaj revoluo ĉirkaŭ la suno, ke oni scias preskaŭ nenion pri la meteologiaj kaj astronomiaj sezonoj, pri la solsticoj kaj ekvinoksoj, kaj pri ĉio simila. Mi ja kredas tion, do, mi preferas resti en la virgaj tempoj de la mitoj, kiam estis ne sciencaj teorioj, sed belegaj diaĵoj, virgulinoj nomataj Horoj (Ωραι), kiuj servis kiel gardistoj de la ĉielpordegoj, super Olimpo (Όλυμπος), la grandioza monto, restadejo de la dioj de la mondo. Tiuj virgulinoj fermis kaj malfermis la pordegojn, ili permesis aŭ malpermesis al la nuboj, al la pluvo, al la plenlumo, al ĉio ajn eniri en la mondon de la mortemuloj, ili, do, venigis la jarpartojn hodiaŭ nomatajn sezonoj. Tiel, estis antaŭfiksita tempo por la plugado, la semado, la rikoltado, ĉio estis per severa precizeco difinita. Tamen, sola mastro de ĉio tio ĉi, de ĉio rilata al la tero, estis mia amata diino, Demetera, kies historion mi rakontos ĉi-sube:



Demetera estis filino de la primitiva diparo de Krono (Κρόνος) kaj Rea (Ρέα), ŝi, do, estis fratino de la reĝo de la dioj, Zeŭso (Ζεύς) kaj unu el la dek du plej potencaj dioj de la mondo. Ŝia nomo, Demetera en la helena lingvo signifas “patrino de la tero” kaj tio estas tute ĝusta, ĉar Demetera estis la diino de la fekundeco. Ŝi estas tiu, kiu donacis al la homoj ilian ĉefan nutraĵon, la gramineojn, kiuj pro tio, en la helena lingvo havas ŝian nomon (δημητριακά). La bona, ĉiam

amema kaj pacama diino staris ĉiam ĉe la flanko de ĉiu terkulturisto dum la plugado, la semado, la falĉado, la draŝado, la muelado. Ŝi estis en ĉiu vilaĝa dometo kaj domaĉo, ĉe la flanko de ĉiu virino kiu prizorgis sian mastrumadon, siajn gefilojn, siajn kort-bestojn. Estas pro tio, ke Demetera estis adorata, senbrue, precipe en la bela silento de la kamparo, en la vilaĝoj, sur foraj altaĵoj, apud akvofontoj, en temploj kaj altaroj modestaj, tute ne riĉaj kaj pompaj. Ŝi estis la plej amata diino, precipe al la virinoj, pri kies propra fekundeco ŝi ankaŭ zorgis ameme.



Demetera plejofte loĝis sur Olimpo, kun la ceteraj dioj, tamen ŝi diferencis de la pli multaj el ili. Ŝi ne estis fiera, aroganta, imponaspekta, ŝi estis je ĉio modesta, tute absorbita de sia tasko. Ŝi diferencis precipe per sia sinteno je la amoraferoj, ĉar Demetera seks-kuniĝis kun nur unu viro, kun Zeŭso, el kiu ŝi akiris sian solan filinon Persefonan (Περσεφόνη). Tiu Persefona iĝis la plej granda, la precipa amcelo de la diino, kiu havis tiom ardan amon al sia filino, ke la homoj diradis, ke Demetera amas Persefonan tiom multe, kiom mil patrinoj kune, amas ĉiujn siajn gefilojn!

Persefona iĝis belega junulino kaj vivis feliĉe en la kamparo, en la senlima vera reĝejo de sia patrino. Unu tagon, tute hazarde, la granda dio de la subtera mondo, de la mondo de la mortintoj, Plutono (Πλούτων), ekvidis de malproksime la belan junulinon kaj tuj li ŝin ekamis. Plutono estis unu el la tri plej grandaj dioj, unu el la tri fratoj, kiuj dividis inter si la mondon. Unua estis Zeŭso, la mastro de la tuta tero kaj inspektanto, supergardisto de la universo. Dua estis Pozidono (Ποσειδών), la mastro de la maro kaj tria estis Plutono, la absoluta mastro de la subtera mondo. Ĉiuj tri estis dioj brilaj, de ĉiuj ceteraj dioj, duondioj, ĉiaspekcaj diaĵoj plej respektindaj. Plutono, do, de malproksime longe observadis la belan junulinon kaj ĉiutage lia amo iĝis pli kaj pli forta. Kiam li informiĝis, ke la junulino estas la filino de Demetera, sin turnis al Zeŭso, al kiu li konfidis sian sekreton kaj sciigis sian neŝanĝeblan decidon, nepre akiri sian amatinon. Zeŭso klopodis kiel eble plej delikate trakti la tre seriozan aferon. Li, ja, akceptis, ke estus granda honoro por la junulino iĝi reĝidino de la triono de la mondo, tamen li provis ekspliki al sia frato, ke tio ne estos akceptita de Demetera, kiu tiele devus disiĝi de sia tre amata filino. Ĉar alia solvo ne estis trovita, la du dioj decidis agi sen aprobo de Demetera, do, unu

matenon, kiam Persefona amuziĝis kun siaj amikinoj en la kamparo, por la unua fojo ekvidis ne konatan, tre belan, buntan kaj tre bonodoran floron. La junulino, admirante ĝin, eksentis strangan animaltiĝon kaj kliniĝis, dezirante ĝin flari. Tiam, mirakle, la tero disŝiriĝis, grandioza ĉaro, tirata de splendaj, tute nigraj ĉevaloj ekaperis kaj belega viro, Plutono mem, en sia tuta brilo kaj majesto, ekkaptis la surpriziĝintan junulinon, kiu povis nur eligi laŭtan, korŝiran ekkriion. Fulme ĉio malaperis kaj restis la malespera ekkrio de la forrabita junulino, kiu, aŭdita de Demetera, vibrigis ties patrinan koron. La diino tuj kuris rekonte al sia filino, sed ŝin ne trovis, Persefona estis malaperinta.



La lamentado de Demetera skuis la tutan kamparon, ĝi atingis la supron de Olimpo, Zeŭso komprenis kio estis okazinta, sed silentis. La malfeliĉa patrino komencis malesperan vagadon tra la tuta mondo. Dum naŭ plenaj diurnoj, senhalte ŝi kuradis

tien kaj tien, sen dormo, sen manĝaĵo, sen ripozo, ŝi serĉis en ĉiu angulo de la tero, tamen tute vane, ŝi ne trovis sian filinon. Ŝi petis ĉies helpojn, ŝi demandis ĉiujn, tamen neniu ŝin helpis, neniu sciis kio okazis al la malfeliĉa Persefona. En stato kompatinda, mizera, tute ne deca al diino, Demetera aŭdacis viziti Helion aŭ Sunon (Ἥλιος), la solan dion kiu ĉion vidas, kiu ne povus diri, ke li scias nenion. Kvazaŭ humila peteganto ŝi genuiĝis antaŭ la brila dio kaj plorpetis pri lia helpo. La granda, bonkora dio, vere la sola kiu sciis kio estis okazinta, en la komenco hezitis, sed fine li ne povis rezisti al la tioma patrina doloro, do, li malkaŝis la veron, li diris, ke forrabinto de Persefona estas Plutono kaj klopodis konsoli la malfeliĉan patrinon, dirante, ke Persefona estas bonsorta, ĉar ŝi iĝis unu el la plej grandaj reĝinoj de la mondo, edzino de unu el la plej potencaj kaj gloraj dioj. La bonintencaj konsoloj ne mildigis la doloron de Demetera, tute male, la ekscio, ke ŝia filino estas en loko, al kiu ŝi neniam povos iri, tute krude emociis ŝin; ŝi nun sciis, ke ŝi povas fari nenion plu. Kiam ŝia lasta klopodo, ŝia alpaŝo al Zeŭso, al la reĝo de la dioj, malsukcesis, la malfeliĉa patrino afliktiĝis, ŝi falis en neelteneblan, daŭran ĉagrenon, ŝi deprimiĝis. Ŝi daŭrigis sian, nun sencelan, vagadon, kaj dume ŝi perdis sian dian

brilon, ŝi aliformiĝis en mizeran maljunulinon kaj tute forgesis kaj forlasis siajn okupojn kaj taskojn. Tiele vagante, iun tagon ŝi atingis Eleŭzison (Ελευσίς), apudan al Ateno (Αθήναι) urbon, kies reĝo estis Celeo (Κελεός). Post tut-taga piedirado, tre laca, ŝi sidis ĉe publika puto por iom ripozi. Tiam, alvenis tie aro da ĉarmaj junulinoj, kiuj intencis ĉerpi akvon. Tiuj junulinoj estis la kvar filinoj de Celeo, reĝidinoj, bone edukitaj, afablaj, bonkonduktaj kaj bonkoraj. Vidinte la mizeran maljunulinon, ĉiuj kune proksimiĝis kaj volonte deziris oferi al ŝi akvon kaj ĉion alian, kion la malriĉa virino bezonas. Ili persiste petis kaj fine konvinkis la diinon sekvi ilin en la palacon, por ke ili flegu ŝin pli komforte. La reĝino Metanira (Μετάνειρα), same bonkora kaj kompatema kiel ŝiaj filinoj, bonakceptis la maljunulinon kaj oferis al ŝi manĝaĵon kaj gastigadon. Ŝajnas, ke la aliformiĝo de Demetera ne tute kovris ŝian dian haloon, ian neklaran nimbon, kiun tamen la pia reĝino distingis. Ŝi, do, vidinte la fremdan virinon, ekstaris kaj oferis al ŝi sian propran troneton, kiun tamen la diino ne akceptis, preferinte ordinaran benketon. Malgraŭ tio, la reĝino, informite, ke la maljunulino havis nek familion nek hejmon, petis de ŝi resti en la palaco kaj preni sur sin la taskon flegi kaj eduki la lastan infanon de la familio, bebon nomatan Demofono (Δημοφών). Nu, Demetera iĝis gubernistino de la bebo kaj enloĝiĝis en la palaco de la reĝa familio, kiun ŝi multe estimis kaj amis. Pro tiu sia amo, ŝi decidis igi Demofonon senmorta kaj pro tio, ĉiuvespere ŝi ŝmiris la korpon de la bebo per ambrozio kaj poste ŝi tenis ĝin kelkajn momentojn super la fajro. Unu tagon, la reĝino neatendite eniris en la ĉambron de la infano, ŝi vidis ke la gubernistino tenis la bebon super la fajro kaj opiniante ke ŝi intencas ĝin bruligi, komencis plorĝeme ekkrii. Tiam, povante fari nenion alian, la veaspekta maljunulino aliformiĝis, ŝi prenis sur sin sian brilan, diecan aspekton kaj eksplikis al la surprizitaj dsiaj gastigantoj kiu ŝi estas kaj kial ŝi suferas kiel ordinara mortema virino. La reĝa familio kaj post nelonge la tuta loĝantaro de la urbo genuiĝis antaŭ la bona kaj malfeliĉa diino kaj petis pri ties protekto kaj favoro. La diino, kiu estis longe jam ĝuinta la gastamon, la amemon, la kompatemon kaj helpemon de la Eleŭzianoj, oferis sian protektadon al la urbo, ŝi petis, ke oni konstruu por ŝi grandan templon, en kiu ŝi enloĝiĝis kaj ĝuadis la amon kaj la honorojn kiujn malavare oferis al ŝi la loĝantoj de la sankta urbo, precipe la virinoj, kiuj bone scias kio ekzakte estas la patrina doloro. La ritojn kaj kultron partoprenis nur loĝantoj de la urbo, tiel iom-post-iome la adorado de Demetera en Eleŭziso ricevis formon kaj sencon de mistera, sekreta doktrino, oferata kaj konata nur al inicitoj. Tiele naskiĝis la mond-konataj

Eleŭzisiaj Misteroj (Ελευσίνια Μυστήρια), kiuj tamen povas esti objekto de alia rakontado.



Demetera ne plu havis ian ajn rilaton kun la ceteraj dioj, ŝi ne plu iris al Olimpo, ŝi ne plu zorgis pri siaj taskoj, pri siaj amataj terkulturistoj, pri la kamparo, ŝi faris nenion,

ŝi interesiĝis pri nenio, ŝi nur ĝuadis la amon de siaj protektataj fideluloj kaj daŭre suferis, gustumante la venenon de sia nekurablebla ĉagreno. Dume, iom-post-iome la plantoj velkadis. La semoj ne plu ĝermis, nenio elkreskadis, ĉio komencis sekiĝi kaj ŝrumpi. La homoj faris ĉion kion ili povis, ili daŭrigis plugi kaj semi, sed ili rikoltis nenion. La bestoj komencis morti, la homoj komencis malsati, post nelonge la verdaĵo de la tero malaperis, ĉio sekiĝis, ĝenerala inanicio minacis la tutan mondon. Zeŭso, en la komenco iom ĝeniĝis, tamen pli poste vere maltrankviliĝis, li, do, sendis la diinon Irisan (Ἴρις), sian personan kurierinon al Eleŭziso, tamen Demetera ne akceptis la senditan diinon, ŝi ne aŭskultis ŝin, ŝi ignoris la petojn kaj ordonojn de Zeŭso, ŝi restis tute indiferenta, enfermita en sia templo. La unu post la alia la dioj, sendataj de Zeŭso, klopodis renkonti Demeteran, paroli al ŝi kaj ŝin konvinki okupiĝi pri siaj taskoj. Ili nenion sukcesis, Demetera eĉ kontakton, eĉ salutvorton rifuzis al la dioj kaj diinoj, kiuj tute ne helpis ŝin kiam ŝi bezonis kaj petegis pri tio. Zeŭso komprenis, ke definitiva, totala pere minacis la mondon, do, li decidis fari la malfacilan paŝon, sin turni al sia frato, al Plutono mem, la sola kiu povus doni solvon al la tiom danĝera, malfacila situacio. Li sendis al la subtera mondo Hermeson (Ερμής), kiu, kiel dio-protektanto de la negocistoj sciis tre bone interparoli kaj kontrakti pri seriozaj aferoj. Fakte, Hermeso, post longa diskutado,

povis prezenti al la granda dio la tute obskuran bildon, la krizecon de la situacio kaj sukcesis finveni kun li al kompromiso, laŭ kiu, Persefona venus sur la teron, kie ŝi restus dum la tri kvaronoj de ĉiu jaro kaj revenus al la subtera mondo, kie ŝi restus kun sia edzo dum ĉiu lasta jar-kvarono. Kiam ĉio estis konsentita, Plutono adiaŭis sian amatan edzinon, sed petis de ŝi manĝi semon de granato, kiun li mem metis en ŝian buŝon.

Oni supozas kaj facile komprenas kia estis la emocio, la entuziasmo, la senbrida ĝojo dum la renkontiĝo kaj rekuniĝo de patrino kaj filino. La momenton, kiam la du virinoj falis la unu en la brakumon de la alia, mirakle, ĉio sur la tero verdiĝis. La plantoj kreskigis abundon da floroj kaj fruktoj, la kampoj pleniĝis je tute matura, falĉad-preta greno, ĉio sur la tero revigliĝis. La dioj, la homoj, ĉiuj estaĵoj estis kontentaj kaj nur Demetera ne povis akcepti eĉ la partan ĉiujaran foreston de sia filino. Tamen, Persefona, eble sub mirakla efiko de la granatsemo de Plutono, certigis sian patrinon, ke ŝi mem deziras resti kelkan tempon kun sia edzo, kiun ŝi amas.

Tiele, ĉio estis feliĉe finita kaj la homoj bone scias, ke kiam Persefona estas en Hadeso (Αδης), Demetera estas malĝoja kaj kun ŝi la tuta naturo estas malĝoja, kaj ĉio estas velkinta, kaj, jes, tiam estas vintro! Do, mi lasas la sciencistojn al iliaj eltrovoj kaj teorioj, mi ne bezonas ilin por kompreni kial venas vintro, mi bone scias kio ekzakte okazas!

La homoj donis la nomon de Demetera al konstelacio, kiu pli poste ricevis la novan nomon Virgo. Tamen, multe pli poste, la unue eltrovita asteroido ricevis la nomon Demetera.

De la ĉielo, do, la eterna patrino, Demetera, daŭre signalas, ke nenio pli granda, grava kaj valora estas en la vivo ol la patrina amo!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo

*** el "GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO"

*** Elekto, aranĝo de bildoj, de **Kostas Kiriakos**

6 >>

Laŭ mia scio literaturemaj esperantistoj ekkonis la poezian arton de Hendrik Adamson el la marta numero 1932 de la revuo Literatura Mondo. Du jarojn poste eldonis la revuo la antologion Dekdu poetoj, kiu enhavis dekunu poemojn de Adamson. Pri lia poezio Kálmán Kalocsay, kiu redaktis la libron, skribis: "Vere oni povas diri, ke ĉi tie la lingvo jam estas ne nur instrumento, sed ankaŭ la temo mem." La arto de la poemoj tiom profunde esprimas la koncernajn temojn: ĉu solecon, senesperon, rezignon, naturan, amon,

ofte miksitaĵojn de ironiemo, ke oni volonte konsentas la diron de Kalocsay. Hendrik Adamson estas poeto, per kies poemoj oni sentas sin aktive partoprenanta ties anime sondeman arton.

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkitaj por la revuo Juna Amiko
Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/adamson.html>

La parko dormis sub la mola neĝa kovrilo. La aleoj silentis senhomaj. La arbobranĉoj neĝarĝentis kaj la glaciaj kristaletoj sur ili respegulis la matenan sunlumon. Aŭdiĝis nur ies grincantaj paŝoj sur la neĝkovrita pado. Onklino Neda kaj ŝia hundo Rad promenis. Ili paŝis malrapide unu apud la alia en ankoraŭ dormanta parko.

Ĉiun matenon dum unu sama horo onklino Neda kaj Rad estis en la parko kaj ambaŭ trairis la vojon de la centra parka pordo ĝis la plej malproksima aleo. De tempo al tempo Rad deflankiĝis de onklino Neda kaj kuris jen antaŭen, jen malantaŭen, kontrolis ion sur la pado, poste ĝi denove revenis kaj daŭrigis kviete akompani onklinon Neda. Sesdek kvinjara, ŝi havis arĝentkoloran hararon, similan al la neĝo sur la branĉoj, diafanajn blujn okulojn kaj karan rideton.

Ĉimatene onklino Neda kaj Rad denove promenis en la parko kaj kiam ili ekiris al la parka pordo por reveni hejmen, onklino Neda eksentis fortan doloron en la brusto, kvazaŭ iu per tranĉilo pikis ŝin. Onklino Neda ŝanceliĝis, sed ne falis, nur sidiĝis sur la proksiman benkon neĝkovritan. Rad tuj eksentis, ke io malbona okazis al onklino Neda kaj ĝi maltrankvile komencis boi. Ĉe la enirejo de la parko estis la budo de la parkogardisto, kiu tra la fenestreto vidis, ke onklino Neda svenis. Li eliris el la budo, proksimiĝis al la benko, kie ŝi sidis kaj demandis:

– Sinjorino, ĉu vi malbone fartas?

– Jes – respondis onklino Neda. – Mia koro tre forte doloras.

– Tuj mi vokos Rapidan Helpon – diris la viro, elprenis el la poŝo sian poŝtelefonon kaj telefonis.

Onklino Neda sidis sur la benko, spirante peze. La doloro daŭris. Por momento ĝi iom malfortiĝis, sed poste tuj denove forte pikis ŝin. Rad staris senmova kaj rigardis ŝin, kvazaŭ deziris demandi kio okazis kaj kial ŝia pala vizaĝo konvulsiĝas.

La aŭto de Rapida Helpo venis. La kuracisto proksimiĝis al onklino Neda, alrigardis ŝin kaj tuj komprenis kio okazis. Oni helpis ŝin eniri al aŭton, kiu rapide sirensone forveturis. Rad restis senmova ĉe la benko, kie sidis onklino Neda.

La parkogardisto eniris la budon kaj komencis trafolumi la matenan ĵurnalon, sed post dudek minutoj li rigardis tra la fenestreto kaj vidis, ke Rad ankoraŭ staras ĉe la benko.

– Strange – diris la gardisto – la hundo ankoraŭ estas tie.

Venonttage matene, kiam la gardisto venis en la parkon, li denove vidis Rad, starantan ĉe la benko. La hundo estis tie kiel hieraŭ kaj certe la tutan nokton ĝi

pasigis ĉe la benko.

La horoj pasis. En la parkon venis homoj promenadi, sed Rad estis tie, ĉe la benko.

– La hundo mortos ĉi tie pro malsato – diris al si mem la gardisto. – Mi kondukos ĝin hejmen kaj donos al ĝi manĝi.

Kiam la deĵoro de la gardisto finiĝis, li proksimiĝis al Rad, prenis ĝian rimenon kaj ekiris kun Rad hejmen. La gardisto loĝis proksime al la parko. Li ligis Rad al arbo en la korto de la domo kaj donis al ĝi akvon kaj manĝaĵon.

– De hodiaŭ vi estos mia gasto – diris la gardisto al Rad. – Kiam via dommastrino revenos de la malsanulejo, vi denove iros al ŝi.

Tamen granda estis la surprizo de la gardisto, kiam la sekvan matenon li vidis, ke Rad ne estas en la korto.

– Certe al la hundo ne plaĉis esti ĉi tie – diris la gardisto kaj ekiris al la parko.

Pli surprizita li estis, kiam vidis Rad en la parko, starantan ĉe la benko, sur kiu sidis onklino Neda.

– Ho, vi venis antaŭ mi – miris la gardisto.

Rad nur turnis kapon al li kaj poste alrigardis la ŝoseon, kien antaŭ du tagoj ekveturis la aŭto de Rapida Helpo kun onklino Neda.

Posttagmeze la gardisto denove prenis Rad kaj ekiris hejmen, sed matene Rad denove estis en la parko.

– Klare – diris la gardisto – vi deziras esti ĉi tie kaj atendi vian dommastrinon.

* * *

Pasis semajno, sed Rad ĉiam estas en la parko ĉe la benko, ĉe kiu svenis onklino Neda.

verkis kaj sendis **Julian Modest** el Bulgario
Sofio, la 14-an de januaro 2019



Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Bruneta sekvirulo, Rramush Hysenaj kaj du liaj fratoj, kvankam du tri jaraj pli junaj, tiel multe similis unu al la alia, kiel estis malfacile distingi ilin. Ili vivis hundece en unuetaĝa kabano, kiun, pli ol hejmon, oni povus konsideri arbustaĵon, konsistanta el ĉifonoj. Sed kiel ĉiuj aliaj romoj, ili tute malatentis pri ilia vivaĉo, vivis ili hodiaŭ por hodiaŭ, ne turmentis sian cerbon por la morgaŭo. Sufiĉis ke ili manĝu tion, kion ili trovis, drinku rakion ¹ ĝis plena ebriiĝo, fiku virinojn dum la vesperoj (jen la siajn, jen tiujn de la najbaroj), alkantu al la junaj rominoj kaj dancu ĝis la tagiĝo.

Tia estis ilia ĉiutageco, sen grandaj celoj, ĝiskiam iun tagon, ilia albana najbaro, proponis ion, kio enspezigus al ili multe da mono. Tio allogis la povrulojn, ĉar, per tiu monsumo, ili povus aĉeti pli da rakio, viando kaj almanĝaĵo, povus allogi kaj elfiku la junulinojn, iun ajn laŭdezire, eĉ ankaŭ iun blankan albaninon. La najbaro estis dirinta ke li helpus ilin en tiu afero, cele por dividi la monon enspezotan. Romoj interkonsentis.

Tia allogo, fare de ilia najbaro, estis iel rompinta ilian harmonion, ĉar igis ilin cerbumadi, supozante longajn tagojn pri la afero. Tamen, finfine ili estis decidinta por engaĝiĝi en tia aventuro. Estiĝu kio devas estiĝi, diris ili al si, kvankam senspertaj en tiaĵoj.

* * *

La tri fratoj troviĝis jam en la benko de la akuzitoj, fronte al iu fremda juĝisto ², parolinte lingvon kiun ili ne komprenis, eĉ unu vorton. La juĝeja aŭlo ne estis tiel granda, kiel antaŭpensis la povrulo Rramush. Ĝi estis pala kaj malvarma, simile al la vizaĝo de viro kiu punus ilin per enprizoniĝo almenaŭ trijara, dum la blanka koloro de la muroj similis al la hararo kaj minijupo de la ties interpretistino.

- Vi estas tuŝinta la kultan objekton, vi estas perfortinta la religian liberecon, - alparolis ilin la mornvizaĝulo etbarba, kaj ili apenaŭ komprenis la vortojn liajn, nek tiujn de la blonda interpretistino, kiu, per sia buŝo, eliginta dolĉan voĉon, prononcis la vortojn al li. Tamen ili komprenis nenion. Fakte, el la tuta ĉi tiu frazo lia, alveninta turbulita en iliajn orelojn, nur la vorton "perforto" ili ja estis kompreninta.

- Mi ĵuru je la vivo de miaj infanoj, sinjoro juĝisto, mi perfortis neniun. Min tion oni donis mem. Nek miaj fratoj faras tiaĵojn...- parolis Rramush, pensante ke li devus respondi, eĉ ankaŭ je la nomo de liaj fratoj, kiuj

ne parolis, sed tremis pro timo, kvazaŭ la vergoj en la akvo, kiomfoje la sidanta viro, fronte de ili, kvazaŭ surtrone, alĵetis ilin siajn okulojn.

- Vi puniĝos po tri jaroj da enprizoniĝo pro rompo de la kruco de la ortodoksa preĝejo- alparolis al ili per decidema tono la fremda juĝisto.

- Envere ni volis vendi ĝin por mono, mi ĵuras, je la spirito de mia jam forpasinta patrino,- klopodis sin defendi la pliaĝa frato, sed la fremdulo apenaŭ volis pluaŭdi, daŭrigante per siaj argumentoj, kulpigantaj ilin pro rompo de la leĝoj kaj de la intercivitana harmonio, ĉar tia ago, laŭ li, lezis la sentojn de granda homgrupo de loĝantoj de ĉi tiu lando.

La fratoj parolis neniun vorton plu. Ne sin defendis, nek reagis, nur aŭskultis la nekompreneblajn vortojn de la etbarbulo kaj rigardadis la blankajn mamojn kaj la longajn gambojn de la interpretistino, la lipruĝo ŝia brilis preter la ceteraj koloroj vidataj en la aŭlo. Ĉiuj tri deziris ke tiu juĝado longu kiel eble plej multe kaj ili kontentiĝu senvestante per sia menso tiun voluptlogan perion, la solan ilin varmiganta en tiu aŭla malvarmo.

Ĉiuj tri sampensis, kiel mordi per dentoj tiujn du cicojn je cidonia koloro, fariĝintaj pli videblaj, kiomfoje ŝi eksidis por legigi la tradukitan verdikton de la juĝejo.

Ĉiuj tri sampensis, kiel kapti kaj premi tiujn du gambojn, interkruciĝintaj de ŝi, kaj turni ŝian korpon laŭdezire, kion ili imagis molan kaj glatan kiel nenio alia.

* * *

La najbaro estis konvinkinta ilin ke, se ili sukcesus vendi en Korĉa ³ la krucon de la malplena preĝejo, troviĝinta fronte de la plej granda biblioteko de nia urbo, ili enspezus milojn, eĉ centmilojn da eŭroj, ĉar ĝi estis origita kaj tial multekostus. Esperante, ke per tio, ili eskapus de malriĉeco, per lia traktoro ili ekveturis tra la celita vojo. La najbaro kunprenis longan ŝnuron, ĉirkaŭ kvindek metrojn, dum la fratoj nenion.

Je la dekdua horo de nokto ili alvenis ĉe la objekto. Rramush kun la du fratoj malfiksus la krucon disde la loko, kvankam havis nenian ideon kiel ili grimpus per ŝnuro enmane sur la muroj de ties preĝejo.

Intertempe, la kvardekjarulo atendus ilin malsupre por porti ĝin per traktoro. Post du horoj da penado, jen provante de la maldekstra flanko, jen de la dekstra flanko de la eksteraj muroj kaj jen provante grimpi de ĝia interno, ili, finfine, atingis la pinton. Ligis forte per ŝnuro la multekostan krucon kaj mansignis al la helpanto de traktorŝoforo ke li altiru ĝin. Li



sparsekurigis sian aŭtilon, kies zumado ege bruis, tiel neebliis senrimarkiĝi, ĉar temis pri urbocentro.

La polico alarmiĝis kaj tuj ekveturis al la okazintejo la unuaj ties aŭtiloj. Iliajn signalojn aŭdis la unua la projektisto de tiu agado, kiu imediate malligis la ŝnuron kaj forkuris disde la preĝejo, lasante la tri fratojn romajn en la manoj de la ursino..

* * *

La leĝaj misiistoj, alvenintaj el la diversaj landoj de la mondo ⁴ decidis ke tiun kazon traktu ili mem kaj ne lasu al la lokaj policistoj, ĉar, laŭ ili, temis pri atako, antaŭe planita, kontraŭ religian templon. La albana

najbaro denove forlasis Rramush-on kaj ties du fratojn, konfesante en la juĝproceso ke li nur deziris helpi al ili portante la oran krucon.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

¹ *Alkoholaĵo*

² *Temas pri jaroj antaŭ 2008, kiam Kosovo administrigis de UNO*

³ *Urbo en Albanio*

⁴ *Temas pri jaroj kiam Kosovo administrigis de UNO, do antaŭ la jaro 2008*

Donaco

-S tefĉo, se vi sciis kiel mi turmentiĝis, ĝis kiam mi elektis donacon por vi. Mi volas, ke vi vere ĝojĝu pri ĝi

– Ĉu vere?

– Jes, kara, mi pensas, ke mi sukcesis.

– Kion vi aĉetis por mi?

– Fermu la okulojn!

– Mi ilin fermis.

– Rigardu nun!

– Mi rigardas.

– Kaj kion vi vidas?

– Sakon.

– Jes, sako.

– Sed ĝi estas virina sako, kara!

– Jes, ĝi belege harmonias kun via helgrizflava kostumo. Se vi sciis kiel mi ĝojis al ĝi, kiam mi ĝin elektis kaj tiajn ŝuojn kun dika plandumo. Vidu kiel ili estas ŝikaj!

– Jes, ili estas ŝikaj, sed ili estas...

– Kio? Tiaj modaj ŝuoj faras la piedojn estu ĉiam sveltaj, elegantaj.

– Se vi tiel diras, sed...

– Vi ne fidus al mia gusto?



tradukis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

– Ha, mi fidus, kial ne, sed...

– La fido, kara, estas reciproka. Vi al mi, mi al vi. Sed ni lasu tiun laboreman paroladon por alia fojo, kaj nun mi montru tion, kion ankoraŭ mi aĉetis por vi.

– Mi rigardegas.

– Al tiuj ŝuoj jen tiu kolumo de arĝenta vulpo. Kion vi diros?

– Ha...

– Diru, nu, diru!...

– Ha...

– Ĉu vi glutis vian langon?

– Mi elsputas ĝin kaj nun mi diros al vi. Ĉiujn tiujn aĵojn mi ne portos. Eble vi ilin portu!

– Sed kiu diris al vi, ke vi devas ilin porti? Mi aĉetis ilin, por ke mi ĝojĝu vin, kiam vi vidos, kiel bone mi estos vestita dum via jubileo.



aŭtoro **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario

tradukis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

*** *Tria premio en blanko prozo en la Lucija Borĉic 2018 Tradukkonkurso de la Kroata Esperantista Unuiĝo* ***

Kakto kaj Lacerto

poemo de Ŝtefo Urban



Kreskis Kakto
en dezerto,
Venis al li
la Lacerto.

Kial Kakto,
pro diablo,
kreskas vi ja
en la sablo ?
Kakt' respondis :

Fulmotondro !
Por ke dormu
ci en ombro !

* * *

Kelkaj homoj sin oferas,
al aliaj multon peras...

de **Ŝtefo Urban**

Fonto: http://www.ipernity.com/blog/fajro38/415058?fbclid=IwAR1AXEjKNh-KA_WxkcNolIHfvYVI9cgDPJ3gv2aP7CEoXREfZF BWdgb9Ys8

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilnusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el *Litovio*

-- oOo --

am geedziĝis kato kaj kokino kaj konstruite por si dometon ekvivis kune. Elirante por ĉasi, la kato diras al la kokino:

– Lasu neniun en la dometon. Se vi enlasos, vi certe pereos.

Post ioma tempo alvenis vulpino kaj petas:

– Onklineto, onklineto, lasu min interen.

La kokino tuj malfermis la pordon kaj enlasis la vulpinon. Kaj ŝi senprokraste kaptis la kokinon kaj ekkuris. La kokino ektimiĝis kaj ekkriis:

– Kato, kato! Mi estas portata tra altaj montoj, tra verdaj arbaroj. Kie estas vi? Savu min!

La kato estis proksime, do li tuj rapidis por helpi. Li forprenis la kokinon de la vulpino kaj ili venis hejmen. Aliafoje forirante en la arbaron por ĉasi, li ree diras:

– Nu, gardu sin! Ĉi-foje vere nenion enlasu en la dometon.

La kokino promesis, ke ŝi nenion enlasos.

Tamen apenaŭ la kato iris iomete foren, tuj aperis la vulpino kaj petas:

– Onklineto, lasu min en la dometon. Mi absolute ne ĝenos vin, nur iomete gastumos. Onklineto!

Aŭskultis, aŭskultis la kokino la dolĉajn vortojn de la vulpino kaj ree malfermis la pordon. La vulpino – kapt la kokinon kaj ekkuregis al la arbaro. La kokino ekklukis el ĉiuj siaj fortoj, vokante la katon por savi ŝin. Bonokaze li troviĝis proksime kaj alkurinte eltiris ŝin el la vulpinaj ungegoj. Kondukante ŝin hejmen, li riproĉas:

– Kial vi ne obeis min? Se vi ankoraŭfoje enlasos la vulpinon, mi plu ne savos vin.

Post kelkaj tagoj li refoje iras por ĉasi, deviginte la kokinon ne malfermi la pordon.

Post ioma tempo la vulpino ree ĉeestas.

– Onklineto, - petas ĝi per maldika voĉeto. – Lasu min interen. Mi nur bonŝercis. Ĉifoje mi certe ne ĝenos vin. Mi sankte ĵuras.

Oni bone perceptas kia estas la kokina prudento: ŝi

iris al la pordo, malfermis ĝin kaj enlasis la vulpinon. Nenion plu ŝi atendis, kaptis la kokinon kaj portas ŝin malatentante ŝiajn kriojn kaj klukadon pri la kata helpo.

– Kato, kato! Mi estas portata tra altaj montoj, tra verdaj arbaroj. Savu min!

Tamen la kato ne klopodis sin pri savado, nur observis, kien la vulpino forportos ŝin. Vidas li, ke ŝi estas enportita en kavernon. Tiam li venis hejmen, kunportis violonon kaj sabron, revenis al la kaverno kaj ekludis: “La sesa edzino, la sesa edzino kun kvinopo da infanoj...”.

Unu vulpido elŝovis sian kapon por vidi, kiu tiel bele ludas. La kato frap al ĝia kapo per la sabro, kaj daŭras ludi: “La sesa edzino, la sesa edzino kun kvinopo da infanoj...”.

La vulpino aŭdas la muzikon kaj diras al alia ido:

– Kuru kaj vidu, kiu tie ludas. Via frato sendube jam dancas.

Tiu elŝovis sian kapon el la kaverno kaj demandas:

– Kiu ludas ĉi-tie?


La kato ankaŭ tiun frapis per la sabro kaj daŭre ludas.

La vulpino sendas la trian idon:

– Esploru, do, kio tie okazas. Viaj fratoj dancas kaj nin tute ne sciigas.

Tiamaniere ĉiuj vulpidoj unu post la alia iris por vidi la muzikiston kaj neniam revenis. Finfine la vulpino mem elŝovis sian kapon el la kaverno, sed la sama sorto atendis ankaŭ ĝin.

Tiam la kato rampis en la kavernon, trovis la kokinon kaj kondukis ŝin hejmen.






Saluton,
En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

John Rawls (1921–2002)

Justeco pere de nescio

Eble vi estas tro riĉa tamen la plejparto de la homaro vivas en malriĉeco, ili vivas mallongan vivon, ili malsanas kaj malsatas. La okcidentaj popoloj vivas en pli bonaj kondiĉoj ol la orientaj.



Kaj tio ne estas justa afero. Alie ĉiuj havus la eblecon por pli bona, sekura kaj sana vivo. Homoj eĉ ne pensas pri tio, kaj tiuj kiuj pensas, diras “Vivo ne estas justa!”. Kelkaj homoj estas tre bonŝancaj, kelkaj pensas pri kiel la socio povus esti pli bone organizita, kaj aliaj eĉ provas ŝanĝi ĝin al pli bona mondo.

John Rawls, modesta Harvard universitata akademiano, en 1971 verkis la libron “**Teorio de Justeco**” kaj ŝanĝis la manieron, ke homoj pensas pri tiaj aferoj. Ĝi estas libro kiu aperis post 20-jara pensado, ĝi estas vere profesia libro eĉ por akademianoj kaj kvankam verkita en tre seka akademia stilo ĝi vendiĝis en tre grandaj kvantoj do ĝi ne restis sur la bretoj de bibliotekoj. Ĝi estas unu el la plej imponaj libroj de la 20-a jc.

Rawls batalis en la Dua Mondmilito kaj troviĝis tre proksime al Japanio en la tempo kiam Usono bombis Hiroŝimon per atombombo. Li pensis, ke la uzado de nukleaj armiloj estas malbona afero, do li poste provis batali por pli bona mondo kvankam li ne partoprenis en la manifestacioj kaj amaskunvenoj de sia tempo. Kontraŭe li pensis profunde pri la problemoj kaj provis meti siajn pensojn sur papere. Dume daŭrigis la milito en Vietnamujo kaj ĉie estis manifestacioj kontraŭ tio. Lia centra ideo estis pri “**Kiel vivi kune?**” kaj “**La manieroj per kiuj la ŝtatoj influas niajn pensojn**”.


La homaro devus kunlabori sed kiel? En nova societo la ĉefa demando estus “Kiu ricevas kion?” Homoj kiuj pensas pri ia kreo de nova societo emas pensi pri siaj propraj situacioj kaj formas siajn pensojn laŭ tio, kaj

pro tio la politika pensado distordiĝas. Pro tio li formis la eksperimenton nomitan “**La Originala Pozicio**” kies ideo estis desegni novan societon sen sciante vian pozicion en ĝi. Ĉu vi havos alian genron? Ĉu vi estos riĉa, talenta, bela, geja, inteligenta, kripla ktp aŭ ne? Malantaŭ tiu “vualo de nescio”, Rawls pensis, ke ni desegnuis pri justan societon, kaj ĉiuj akceptus la principojn de libereco kaj egaleco.

La “**Principo de Libereco**” estas la bazaj liberecoj, kiujn oni ne povos limigi, kaj eĉ tiam tio povus okazi por plibonigi la vivon de la plejmulto da homoj.

La “**Principo de Diferenco**” estas pri egaleco. La societo devos provizi al tiuj kun malavantaĝoj pli egalan riĉecon kaj eblecon. Bankisto rajtus ricevi 10,000-oblon de la baza salajro, nur se tiuj, kiuj vivas pere de baza salajro ricevus kreskon en sia riĉeco, kiun ili ne ricevus alie. Neniu ricevus gratifikon se tio ne kontribuas al la enspezo de la malriĉuloj. Estante fama artisto aŭ sportisto oni ne rajtus ricevi tiajn grandajn sumojn da mono. Tamen multaj homoj pensas kontraŭ tio.

Filozofoj de la 21-a jc fakte perdis kontakton kun la gravaj pensuloj de la pasinteco. Tamen la verko de Rawls “Teorio de Justeco” estas unu el la plej malmultaj verkoj de tiu jc kiu meritas esti menciita en la sama nivelo de pensoj kaj verkoj de Aristotelo, Hobbes, Locke, Rousseau, Hume, Kant ktp. Eble la modesta Rawls ne konsentus pri tio. Tamen lia verko inspiris multajn nuntempajn filozofojn kiel Michael Sandel, Thomas Pogge, Martha Nussbaum, Will Kymlicka ktp, kiuj pensas, ke filozofio devas trakti profundajn kaj malfacilajn demandojn kiel “Kiel ni povas kaj devas vivi kune?”.



La novaj filozofoj ne plu timas proponi kaj stimuli sociajn ŝanĝojn. Ili kredas, ke filozofio ja devas ŝanĝi nian vivmanieron kaj ne nur nian diskutmanieron pri tiu afero.

.(daŭrigota)

-- Se ekzemple virino decidis murdi sian edzon ...
 -- **Kial?**
 -- ... el distanco. -- Ĉar ŝi amas alian viron. Ŝi do aranĝas ...
 -- **Kiun ŝi amas?**
 -- ... alibion -- Pri la amanto poste. Ĉirkaŭ Kristnasko ŝi troviĝas 500 kilometrojn for de la edzo.
 -- **Strange, en la festa tempo!**
 -- Ĉar malsanas ŝia patrino ... Kaj ŝi sendas al li viando-pasteĉon ...
 -- **Venenitan?**
 -- ...kiun li tre amas -- Venenotan.
 -- **otan?**
 -- Aŭ veneniĝontan, pro putroveneno. Antaŭ Kristnasko la pakaĵoj restas ja longe en la poŝto --
 -- **Nu, sed ĉu sufiĉe longe?**
 -- Por garantii tion, ŝi aĉetas dufoje pasteĉon. Unue, senparade; due, kelkajn tagojn poste, kaj iel akcentas la okazon, por ke la butikisto memoru ŝian aĉeton --
 -- **Kaj tiam ŝi ekspedas la malnovan?**
 -- Jes. La edzo ricevos ĝin kun ankoraŭ kvin, sestaga prokrasto. Tiun tagon li decidis marŝi sur montetaro por mediti personan problemon ...
 -- **Kaj kunportas la pasteĉon?**
 -- ... ĉar ankaŭ li enuas ŝin kaj sopiras alian. -- Jes, kun la pasteĉo.
 -- **Kaj li manĝas ĝin sur la kamparo, havas stomakdolorojn, kaj mortas sen helpo.**
 -- Jes, li marŝas kaj dume legas leteron, kiun li ĵus ricevis de sia kaŝa amatino ...
 -- **Ĉu gravas aldoni tion, se li tuj mortas?**
 -- Temas nome pri sentimenta korespondado, kiun li kondukadis en fraŭla tempo, sub pseŭdonimoj, kaj kiun li reprenis, kiam li enuis sian edzinon. Li subskribis sin Florizel, kaj ŝi, Miranda; kaj ŝi ja tiel perfekte simpatiis, komprenis lin, kontraste al lia edzino. Kaj li ŝin komprenis, tute male de ŝia stulta edzo --
 -- **Miranda do havis edzon?**

-- Ne dum la unua korespondado. Ssd post ties ĉeso ambaŭ edziĝis, la geedziĝoj ne prosperis, kaj ili serĉis denove la malnovan konsolon kaj komprenon.
 -- **Kaj li mortas sur la vintraj montetoj.**
 -- Kun letero de Miranda en la poŝo. Kaj atentu: li tute klare mortis de pasteĉo, kiun sendis al li lia edzino --
 -- **Sed ŝi aperas senkulpa --**
 -- Ĉar ŝi ŝajne sendis freŝan pasteĉon --
 -- **ne kalkulinte kun la poŝta prokrasto dum la kristnaska trafiko.**
 -- Kaj sur la mola pakaĵo la stampo ŝmiriĝus, do ne avertus la edzon pri la sendodato.
 -- **Do ŝi elportas ĝin seke! Sciu, ne estas popuiare hodiaŭ, ke la krimulo eskapu!**
 -- Atendu. Kiam oni trovas la kadavron, oni transdonas al la edzino la leteron el lia poŝo. Kaj ŝi rekonas, konsternite, ke ŝi mem ĝin skribis.
 -- **Ŝi mem??**
 -- estas Miranda. Kaj li ...
 -- **Florizel!**
 -- Do volante forigi la nekompreneman edzon por fuĝi al la komprenplena Florizel --
 -- **Ŝi mortigis ambaŭ!**
 -- Per unu kuglo. -- Necesas nur vesti la skeletan skemon per karno, krei amason da personoj, plekti la interrilatojn, disvolvi la psikologian flankon kaj tiel torni la temon, ke la fino batu el pura ĉielo -- kaj jen vi havos furor-romanon!
 -- **Do elverku ĝin!**
 -- Aŭ, se oni estas tro inerta, oni simple titolas ĝin "Romano en minimumo" kaj ĝin sendas al la Nica Literatura Revuo.

verkis **Reto Rosetti** el Svislando

Aperis en **Nica Literatura Revuo**, 4/2, paĝoj 54-55

Fonto: <http://www.ipernity.com/doc/esperanto-muzeo-svitavy/11003851/in/album/228556>

17 >> sunradiojn. La hirundoj kantis, la sunradioj ridetis, la venteto zumetis.

— Nun mi estas feliĉa — suspiris la arbofolieto, poste la maro luis ĝin endormiĝi

tradukis el la hungara lingvo **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

fonto de la traduko: http://www.hoxa.hu/?p1=forum_tema&p2=33127#hsz25544244



MALJUNIĜO

Malhelas aŭroroj,
Kaptas la tim',
Paliĝas koloroj,
Ŝrumpas l' anim.

Mi ne estas kuraĝa
Kaj timegas oldule
En svageco miraĝa
Vivi kvazaŭ nebule.

En streĉoj l' irado,
L' menso en fum',
Al voj' de l' vivperdo
Rampas mallum'.

KIAL?


Rampas amaroj, timoj kaj tristoj
Dense tra Senlumi'.
Kial do inter esperantistoj
Ĉiam vigliĝas mi?

Dronas vivantoj en malekzistoj
Kvazaŭ ĉe l' mondfin'.
Kial do inter esperantistoj
Tim' ne turmentas min?

Malgraŭ aspiroj, streĉoj, rezistoj
Venkas la vivmalhel'.
Kial do inter esperantistoj
Lumas al mi la bel'?

Je la kruele rabaj persistoj
Siblas la malesper'.
Kial do inter esperantistoj
Verdas por mi la ter'?
Kial?!...

** unue publikigita en la volumo Survoje
(2005)*



Aŭtuna fabelo

Sur la plej supra branĉo de alta arbo vivis malgranda folieto. Nuntempe ĝi estis tre trista. La venteto vane venis al ĝi por ludi, ĝi ne regajiĝis.

— Kial vi ne balanciĝas kun mi? — demandis la venteto. — Mi vidis, vi ĉiam babiladas kun malgranda birdo. Ĉu ĝi estas pli amuziga, ol mi? Nu, ankaŭ mi trovos alian amikon!

La arbofolio esploris aŭdante ĝin.

— Ne ĉagrenu min, venteto, vi povus scii, kiom mi amas vin kaj vi povas vidi mia sorto kiom malgajiĝis. Antaŭe matene mi baniĝis en oraj sunradioj, kaj hirundoj diris al mi bonan matenon. Nun nek sunradioj, nek hirundoj. Kien ili iris? Kial ili forlasis min? Rigardu mian vangon, mi tute maljuniĝis pro la malĝojo, ĝi jam estas ankaŭ sulka, pluveroj povas sidiĝi en ĝi de mateno ĝis vespero.

La venteto kompatis la arbofolion. Ĝi karesadis kaj konsolis ĝin, sed tiu ploregis kaj deŝiriĝis de la branĉo falante al la direkto de tero.

Sed venteto ne forlasis sian etan amikon: ĝi flugigis ĝin dirante:

— Mi portas vin laŭ via deziro. Kien ni flugu?

tradukis Apáti Kovács Béla el Hungario

La arbofolio tion ne sciis.
Ĝuste birdeto flugis sur la arbon. Ĝi miris, ke ĝi ne trovis tie la arbofolion, alfoje ĝi jam mansalutadis de malproksimo, apenaŭ ĝi atendis la portitajn novaĵojn.

— Tie estas la birdeto — ĝojegis la arbofolio — kun kiu vi vidis babiladi min. Ĝi promesis, ke alportos novaĵojn pri hirundoj. Eble ĝi scias, kien ni devas iri post ili.

Do, ili flugis al ĝi. La birdeto rakontis sia kamarado vidis, kiam la hirundoj kolektiĝis decidante forlasi ĉi regionon kaj ili ekiras trans la maron. Ili diris: tie ĉiam brilas oraj sunradioj.

— Ni iru post ili! — petegis la arbofolio.


La venteto obeis. Ili flugis trans montoj kaj valoj, super arbaroj kaj kamparoj ĝis ili atingis la maron. Ili flugis eĉ trans ĝi, kiam hirundo flugis preter ili. Ĝi tuj rimarkis la arbofolieton, kiu estis kara dommastro kun siaj aliaj kunuloj. Ĝi ekĝojegis kaj rapide ĝi alvokis la hirundojn, sed ĝis ili alvenis tien la arbofolio estis jam tre mallaca. La hirundoj singarde metis ĝin sur la brilanta dorso de la maro. Tie ĝi luliĝis ĝuante la



EN LA LANDO DE LA RUJUKOJ

rakonto de Henriko Bolo *

(Heinrich BÖLL: *Im Lande der Rujuks*)



La grandaj kapabloj de *James Wodruff* jam frue konatiĝis al eta rondo de specialistoj, kaj se mi mallonge raportas pri tiuj kapabloj, mi liberiĝas el malnova dankodevo, ĉar - kvankam de jaroj ni estas dis-koleriĝintaj - tamen, James Wodruff estis mia instruisto: li okupis

(ankoraŭ -as) la solan katedron pri rujukistiko, la solan kiu ekzistas en tiu ĉi mondo, li plenrajte konsideratas kiel la fondinto de la rujukistiko, kaj se li havis dum la lastaj du jaroj eĉ nur du disĉiplojn, oni ne subtaksu liajn meritojn, ĉar li malkovris tiun tribon, esploris ĝian lingvon, ĝiajn morojn, ĝian religion, gvidis du ekspediciojn sur malgastema insulo sude de Aŭstralio, kaj lia merito restas, eĉ se li subiĝis ankaŭ al eraroj, nemezurebla por la scienco.

Lia unua disĉiplo estis *Bill van der Lohe*, de kiu tamen nur raportindas, ke en la haveno de Sidneo li pripentis sian vivon, fariĝis monŝanĝisto, edziĝis, generis infanojn kaj poste, en la interno de Aŭstralio, mastrumis bovbredejon: Por la scienco Bill perdiĝis.

La dua disĉiplo Vodrufa estis mi: dek tri jarojn de mia vivo mi dediĉis al lernado de lingvo, moraro kaj religio de la rujukoj; kvin pliajn jarojn mi pasigis studante medicinon, por vivi kuraciste ĉe la rujukoj, sed mi rezignis pri la ŝtata ekzameno, ĉar la rujukoj - prave - ne interesiĝas pri la diplomoj de eŭropaj altlernejoj, sed pri la kapabloj de kuracisto. Krome, post dekokjara studado mia senpacienco konatiĝi kun realaj rujukoj, kriziĝis, kaj mi volis ne plu semajnon, volis ne plu tagon atendi, por fine vidi vivantajn ekzemplerojn de popolo, kies lingvon mi flue parolis. Mi pakis dorsosakonjn, valizojn, transporteban apotekon, mian instrumentujon, kontrolis mian Traveller-ĉekaron, faris - por ĉiaj kazoj - mian testamenton, ĉar mi posedas kamparan domon en Ejfela Montaro kaj profitas la uzrajtojn de fruktobieno ĉe-rejna. Poste mi prenis taksion al la flughaveno, aĉetis flugbileton al Sidneo, de kie devis min preni balenkaptulo.

Mia instruisto James Wodruff akompanis min. Li

mem estis tro kaduka por riski ankoraŭ ekspedicion, sed adiaŭe ankoraŭ enmanigis al mi sian faman verkon "Popolo proksima al poluso", kvankam li tre bone sciis, ke tiun skribaĵon mi kapablis citi parkere. Antaŭ ol mi eniris la flugmaŝinon, Vodrufo vokis al mi:

"Bruwal doidoi duraboi!" - kio (en libera traduko) povus signifi: La spiritoj de l' aero protektu vin! Precize ĝi ja signifus: La vento ne sendu misigajn spiritojn kontraŭ vi!, ĉar la rujukoj vivas de fiŝkaptado, kaj la favoro de la vento estas al ili sankta.

La vento ne sendis misigajn spiritojn kontraŭ ni, kaj mi alteriĝis bonfare en Sidneo, alboridiĝis tie al la balenkaptulo, ok tagojn poste estis elmetita al eta insuleto, kiu, laŭ la asertoj de mia instruisto, devis loĝi de la P-rujukoj, kiuj distingiĝas disde la veraj rujukoj per tio, ke ilia aboco enhavas la p.

Sed la insulo montriĝis neloĝata, almenaŭ de rujukoj neloĝata. Mi eraris tutan tagon inter magraj herbejoj kaj krutaj rokoj, trovis ja spurojn de rujukaj domoj, por kies konstruo ili uzas fiŝgluaĵon kiel morteron, sed la sola homo, kiun mi renkontis sur tiu insulo, estis ĉasisto de lav-ursetoj, survoja por eŭropaj bestĝardenoj. Mi trovis lin ebria en lia tendo, kaj post kiam mi vekis lin, certigis lin pri mia sendanĝereco, li demandis min en sufiĉe vulgara angla lingvo pri certa Rita Heyworth. Ĉar mi ne komprenis la nomon, li skribis ĝin sur slipeton kaj ĉe tio rulis volupte la okulojn. Mi ne konis virinon kun tiu nomo kaj ne povis lin informi. Tri tagojn mi estis devigata elteni la societon de tiu trivialulo, kiu parolis preskaŭ nur pri filmoj. Fine mi povis marĉande akiri de li, kontraŭ transskribo de Traveller-ĉekoj en la valoro de 80 dolaroj, gumboaton, kaj en mortdanĝero transremis dum trankvila maro al la ok kilometrojn disa insulo, sur kiu devis loĝi la veraj rujukoj. Tiu indiko almenaŭ pruviĝis vera. Jam de malproksime mi vidis homojn stari ĉe la bordo, vidis pendigitajn retojn, vidis boatobudon, kaj energie remante kaj mansvingante mi proksimiĝis al la bordo, surlipe la alvokon: "Joi wuba, joi wuba, buweida guhal!" (De la maro, de la maro, mi venas vin helpi, fratoj!)

Sed kiam mi jam pli proksimiĝis al la bordo, mi vidis, ke la atento de la tie starantoj estis direktita al alia veturilo: la pukpukpuk-ado de motorboato proksimiĝis de okcidento, tukoĵ svingatis, kaj mi alboridiĝis tute neatentate sur la insulo de mia sopiro, ĉar la motorboato alvenis preskaŭ samtempe kun mi, kaj ĉiuj kuris al ties paŝejo.



Mi iris lace mian boaton sur la strandon, malkorkis la konjakbotelon de mia portebla apoteko kaj prenis profundan gluton. Se mi estus poeto, mi dirus: revo al mi disrompiĝis - kvankam revoj ja ne povas rompiĝi.

Mi atendis, ĝis la poŝtboato estis for, surŝultris mian pakaĵon kaj iris al konstruaĵo, kiu portis la senornaman surskribon "Bar". Barba rujuko tie kaŭris sur seĝo kaj legis poŝtkarton. Mi sinkis elĉerpote sur benkon kaj diris mallaŭte: "Doidoi kruw mali" (la vento elsekigis mian gorĝon). La maljunulo flankenmetis la karton, rigardis min mirigite kaj diris en miksaĵo de rujuka kaj filmangla: "Venu, knabo, diru klare. Ĉu bieron aŭ viskion?"

"Viskion", mi diris senforte. Li leviĝis, ŝovis al mi la poŝtkarton kaj diris: "Jen legu kion skribas mia nepo al mi."

La karto havis la poŝtstampon Hollywood, kaj sur la dorsa flanko troviĝis unusola frazo: Generinto de mia generinto, venu trans la grandan akvon, ĉi tie ruliĝas la dolaroj.

Mi restis sur la insulo ĝis la alveno de la sekva poŝtboato, vespere sidis en la "Bar" kaj fordrinkis miajn Traveller-ĉekojn. Eĉ ne unu tie parolis ankoraŭ puran rujukan, nur oni ofte menciis nomon de virino, kiun mi unue kredis mita figuro, sed kies deveno intertempe klariĝis al mi: Zarah Leander.

Mi konfesu, ke ankaŭ mi rezignis la rujuk-esploradon. Nu ja, mi reflugis al Vodrufo kaj eĉ ne evitis disputon pri la uzo de la vorto "buhal", ĉar mi insistis pri tio, ke ĝi signifas akvon, sed Vodrufo obstinis pri tio, ke ĝi signifas amon.

Sed jam delonge tiaj problemoj ne plu gravas al mi. Mi forluis mian kamparan domon, kulturaj fruktoj kaj ankoraŭ karesas la ideon kroni mian medicinistudadon per ŝtata ekzameno, sed mi fariĝis nun kvardekkvinjara, kaj kion mi iam faris kun scienca seriozo, mi nun faras kiel ŝatokupo, pri kio Vodrufo

aparte indigniĝas. Dum la laboro ĉe miaj fruktaroj mi kantas antaŭ mi rujuk-kantojn, mi ŝatas aparte tiun ĉi:

"Wo suhal buwacha
bruwal nui loha
graga bahu, graga wiuwa
moha deiwa huwacha."

(Kial vin logas la foro, mia filo,
ĉu ĉiuj bonaj spiritoj forlasis vin?
Ne estas fiŝoj tie, ne estas kompato,
kaj via patrino ploras pro sia filo.)

Ankaŭ por sakri taŭgas la rujuka lingvo. Kiam la pogradaj komercistoj volas min trompi, mi mallaŭte diras antaŭ mi: "Graga weita" (Nenian benon tio alportu al vi), aŭ: "Pichal gromchit" (La fiŝosto restu en via gorĝo), unu el la plej teruraj sakroj de la rujukoj.

Sed kiu sur tiu tero ja komprenas la rujukan, krom Vodrufo, al kiu de tempo al tempo mi sendas keston da pomoj kaj poŝtkarton kun la vortoj "Wahu bahui" (Estimata majstro, vi eraras), al kio li kutimas respondi, same sur poŝtkarto: "Hugai" (Kabeisto), kaj mi rigardas suben al la Rejno, kiu tie preterfluas jam tiom longe.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo
traduko reviziita 2002-09-10
Kopirajto pri la traduko ©1999


*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/rujukoj.html>

* *Heinrich Theodor BÖLL [HAJNriĥ Bel]* (naskiĝis la 21-an de decembro 1917, mortis la 16-an de julio 1985) estis germana verkisto de ruino-literaturo. Li gajnis la Premion Georg Büchner en 1967 kaj la Nobel-premion pri literaturo en 1972.

Esperanto - Nemateria Kultura Heredaĵo - En Kroatio

Kroata Esperanto-Ligo ĵus ricevis leteron, fakte la decidon de ministerio pri kulturo, kiu konfirmas, ke Esperanto estis deklarita nemateria kultura heredaĵo en Respubliko Kroatio, konforme al la Leĝo pri protekto kaj gardado de kulturaj valoroj.



La kultura valoro Esperanto eniros la registron de kulturaj valoroj de Respubliko Kroatio sub la numero Z-7298.

Supozeble la oficialan decidon oni povas

konsideri la plej granda atingo en la 110-a historio de Esperanto en Kroatio.

Post Pollando ankaŭ en Kroatio Esperanto estas la protektata nemateria kultura heredaĵo. Ni esperas ke la kroata dokumento helpas al aliaj landoj efektivigo la kulturalan protektadon de Esperanto. La procezo de enirigo de Esperanto en la nacian registron de kulturaj nemateriaj heredaĵoj daŭris kvar jarojn.

Spomenka Ŝtimec
prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo

Ŝercoj



Du amikinoj.

- Karulino, kiom vi pezas?
- 120 kilogramojn kun okulvitroj.
- Sed kiom vi pezas sen okulvitroj?

- Sen okulvitroj mi ne vidas la pesilon.

Polo vizitas oftalmologon.

La kuracisto al li montras:

CZJWINOSTAWCZ

- Ĉu vi kapablas legi tion?

- Ĉu legi?! Mi konas tiun ulon!!!

Ebriulo en la haltejo eniras la buson kaj ekkrias, dum ŝoforo reprenas la iradon:


- Tiuj homoj malantaŭe sidantaj estas fikaĉuloj! tiuj sidantaj meze estas inaĉaj sentaŭguloj! kaj ĉiuj antaŭe sidantaj estas putinidoj!

La ŝoforo tuj kaj draste bremsas la buson, premkaptas la ebriulon je la brusto kaj minace diras:

- Nu, spritulo, se vi kuraĝas nun, bv. ripeti kiuj estas fikaĉuloj, sentaŭguloj kaj putinidoj...

La ebriulo, kun gapkonfuza mieno respondas:

BILL ASSOTT



"...Kaj jen Ralf', nia anestezisto."

- Kiel diable mi povas scii... per via subita bremsado vi miksis ĉiujn!!!

Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



KRIPTA KRUCVORTENIGMO

Rekonstruu krucvortenigmon anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

Fonto: Semajno de Enigmoj #3 <http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la lasta paĝo)

1	Z										
7	A						Ĉ				Ŭ
11	M										
14	E										
15	N										
19	H										
6	O							Ŝ			
22	F										

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Je la lasta fojo ŝi laŭvoĉe diris la nomon de Jurij. Pri li, ŝi ŝajne refermis siajn maljunajn lipojn por ĉiam. Kiam la aliuloj parolis pri Jurij, ŝi ne respondis, restis senvorta kaj malvarma, vakue rigardanta kun speco de glacia malespero.

La vintro estis terura. Mankis pano, vestoj. Nur la juveloj alportitaj de Tatjana Ivanovna foje havigis al ili iom da mono.

La urbo brulis; la neĝo dolĉe faladis, kovrante la bruligitajn trabojn de la detruitaj domoj, la kadavroj de la homoj kaj de la dispecigitaj ĉevaloj. Dum aliaj momentoj, la urbo ŝanĝiĝis ĉar alvenis nutraĵoj : viando, fruktoj, kaviaro... Nur Dio sciis kiel...

La kanonado ĉesis kaj la vivo revenis, necerta, ekzalta.

Ekzalta... tiel sentis nur Cirilo kaj Lulu. Pli poste, la memoro pri iuj noktoj, pri promenado en barko kun aliaj junuloj, pri la gusto de kisoj, pri la vento, kiu blovdas dum la tagiĝo sur la malkvietaj ondoj de la Nigra Maro; ĉio tio neniam viŝiĝos el ili...

Finiĝis la longa vintro, kaj unu somero kaj la sekva vintro, kiam la malsatego iĝis tiel grava, ke la mortintaj infanoj estis amase entombigitaj en malnovaj sako. La Karinoj travivis.

En majo, ili sukcesis iri sur la lastan francan ŝipon, kiu forlasis Odeson, marveturis al Konstantinopolo kaj poste al Marsejlo.

Ili elŝipiĝis en la haveno de Marsejlo la 28an de majo 1920.

En Konstantinopolo ili jam vendis la restantajn juvelojn kaj ili posedis iom da mono, kudritan en ilian zonon laŭ la kutimo...

Ili portis sur si vestaĉojn, havis strangan timigan mienon, mizeran kaj malmildan. Malgraŭ ĉio, la infanoj aspektis gajaj; ili ridis kun ia malhela facilanimeco, kiu despli sentigis al la maljunuloj ilian propran lacecon.

La klaran aeron de majo plenigis odoro de floroj kaj pipro; la homamaso malrapide paŝis, haltis antaŭ montrofenestroj, ridis kaj laŭte parolis; la lumoj, la muziko en la kafejoj, ĉio tio aspektis stranga kiel en

sonĝo.

Dum Nikolaj Aleksandroviĉ rezervis ĉambron en hotelo, la infanoj kaj Tatjana Ivanovna iom restis ekstere. Lulu, kun pala vizaĝo antaŭstreĉita, fermis siajn okulojn, enspirante la parfumitan vesperaeron. La grandaj elektraj globoj lumigis la straton per maldensa blua lumo; bukedoj da maldikaj arboj movetis siajn branĉojn.

Matrosoj preterpasis, ridante rigardis la beletan senmovan junulinon.

Unu el ili dolĉe ĵetis al ŝi pecon da mimozo. Lulu ekridis.

"Jen bela ĉarma lando", ŝi diris. " Kia sonĝo! Njanjuŝka, rigardu..."

Sed la maljunulino sidis sur benko kaj ŝajne dormetis, kun naztuko etendita sur ŝia blanka kapo, kun la manoj krucitaj sur ŝiaj genuoj.

Lulu vidis, ke ŝiaj okuloj daŭre restas malfermataj kaj fikse rigardas antaŭ si.

Ŝi tuŝis ŝian ŝultron kaj vokis:

"Njanjuŝka! kio okazas al vi?"

Tatjana subite tremetis kaj stariĝis.

En tiu momento Nikolaj Aleksandroviĉ mansignis al ili.

Ili enpaŝis kaj trairis la halon, sentante scivolajn rigardojn post la dorso.

La dikaj tapiŝoj, je kiuj ili jam dekutimiĝis, ŝajnis fiksiĝi al iliaj plandumoj, kvazaŭ gluo.

En la gastejo, la orkestro ludis. Ili haltis, aŭskultis tiun ĵazon, kiun ili aŭdis je la unua fojo; ili sentis iun svagan abomenon kun sensenca ravo.

Tio estis alia mondo...


Ili eniris en sian ĉambron, longe staris antaŭ la fenestroj, rigardante la aŭtojn preterpasi sur la strato.

La infanoj rediris:

"Ni eliru! Ni eliru!... Ni iru al kafejo, al teatro..."

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio



Al korpulenta Bov' la Ran' komparis sin
Kaj pri dikec' konkuri ekdeziris:
Envio regis ghin.

Shveligis sin la Ran', pufighis kaj blovspiris.

"Kvakulo, diru nun, chu estas jam egal'?"

Al Ran' sin turnis ghi — "Neniom en real'!»

"Jen vidu, kiel mi blovigis por konkuri!"

Vi diru nur,

Chu jam dikighis mi?" — "Ne larghas la figur'."

"Kaj kiel estas nun?" — "Aspekt' en sama stato."

Pufighis Rano plu per la fervora blov',

Sed ne atingis ghi dikecon de la Bov',

Kaj estis pro shveligh' nur kveva rezultato.

Al nia viv' similas la satir':

Mizera burgh' pretendas kun aspir',

Imiti plene al bonhava vir',

Kaj eta oficist' — al nobla kavalir'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio

tradukis **Sergej Grigorjevič Rublov** (1901-1979)

Ukrainio



El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (31)

DUA PARTO - LA VIVO

56



La scianto ne parolas.

La parolanto ne scias.

Oni fermu sian buŝon

kaj fermu siajn pordojn,

oni obtuzigu sian sagacon,

malnodigu siajn konfuzajn pensojn,

moderigu sian lumon,

komunigu sian surteran.

Jen la kaŝinta komuneco nomata TAŬO.

Tiun, kiu havas ĝin,

oni nek povas influi per amo

nek per frido.

Nek per gajno nek per damaĝo.

Nek per pompo nek per malico.

Tial tiu estas la plej adorata surtere.

Rimarkoj de Anniespera:

„Sagaco“ devus esti „akreco“ laŭ la originalo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Malakrigi sian akrecon,“

„Surtera“ devus esti „polvo“ laŭ la originalo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Miksiĝi kun la polvo“

Rimarko de Cezar

Ke parolanto ofte eĉ ne scias, kion li parolas, estas drasta vero, koncernanta multajn homojn. Kutime homoj ja jam pensas, ke ili scias ion, se ili nur provas kompreni saĝulon. Pli da modesto efektive estus pli deca por ni ĉiuj, se temas pri la propra saĝo. Tiel certe pensis ankaŭ la filozofo Sokrato, kiu laŭsence diris, ke li scias nenion.

(daŭrigota)

5 >> kino kiu estis estingiĝanta ene de si. Lia revo – akiri kameraon kaj produkti filmon jam dum en sia 9-a jaraĝo – kaj kiun li prokrastigis tiom longe, reviviĝis. Li pere de tiu filmo rememoris la fabelan kaj magian econ de kino arto. La ĉefa scenejo de la filmo, iu stacidomo, estis ankaŭ lia favorata ĉar li ankaŭ amis vagonarojn.

Al sia menso venis la filmo en kiu ĉefrolis John Hurt kaj Brenda Blethyn: “La Nokta Vagonaro” (Night Train 1998). La filmo estas pri krimulo de fraŭdado, kiu eliras el la malliberejo kaj luas ĉambron. Li poste havas aferon kun la mezaĝa filino de la posedantino.

Ili aljuĝas siajn pasintecojn, poste modelaj vagonaroj kaj fine la longe sopirata vojaĝo per vagonaro. Tamen kontrabandistoj postsekvas ilin.

Alian filmon li rememoris: “Viro en la vagonaro” (Man on the Train - 2009). Johnny Hallyday, Jean Rochefort... Viroj kun malsimilaj karakteroj sed, kiuj zorgas la vivon, unu de la alia. Iu pensiulo instruisto, kiu pasigis sian tutan vivon en la sama urbeto, kaj iu gangstero, kiu ĉu tion povus fari, li forlasus la nelegajn aferojn kaj ŝatus ekloĝi ie.

En la festo de lia cirkumcido oni alportis multajn donacojn al li. Hazarde du amikoj de lia patro alportis

>>>

Malgranda Slovakio en meza Eŭropo (kun areo 49 035 km²) havas 1626 registritajn mineralajn termofontojn. La famo venas de kvin kuracfontoj, el kiuj ŝpruciĝas kuracakvo kun temperaturo de 37,7-40,0 C. La plej varma fonto havas temperaturon de 94 C. Plia kuraca produkto estas la sulfura mineralŝlimo uzata por tutkorpa volviĝo.

La slovakajn fontojn konis ne nur ĝermanaj triboj de kvadoj kaj markomanoj, sed ankaŭ romiaj legioj. La unua skriba mencio pri kuracfontoj devenas de 1247. Iliajn sanigajn efikojn priskribis jam kuracisto Georg Wernher en 1551 en la latinlingva libro Admirindaj akvoj de la hungara reĝlando (latine: Hypomnematio de admirandis Hungariæ aquis).

Trenčianske Teplice

Unu el la plej malnovaj kaj multe vizitataj banlokoj en Slovakio estas Trenčianske Teplice [trenčianske teplice] (malgranda urbeto ĉirkaŭ 150 km norde de la slovakia ĉefurbo Bratislavo). Ĝi situas je alteco de 272 m super la marnivelo en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de montara masivo Strážovské [sraĵovske].

Tiu moderna banurbeto kun pli ol 1000 litoj proponas tutjare kompleksan kuracadon al preskaŭ 20 000 malsanuloj el Slovakio kaj eksterlando, ĉefe el Ĉeĥio, Aŭstrio, Germanio, Hungario, Rusio ktp. En Trenčianske Teplice estas ankaŭ varia kuracprogramo por individuoj, grupoj kaj familioj.

Historio


Laŭ legendo la kuracfontojn malkovris ŝafaŝtisto, kiam li serĉis perditan ŝafidon. Anstataŭ ŝafido li trovis malgrandan lageton kun varma akvo, kiu eligis fortan sulfurodoron. Li banis sin en la lago kaj saniĝis. Tiun epizodon prezentas hodiaŭ ankaŭ la blazono de la urbeto Trenčianske Teplice, sur kiu estas ŝapaŝtisto, ŝafido kaj kuracfonto.

La plej grandan meriton en la evoluo de la banloko havas familio Ilésházy [ileŝhazi], kiu konstruigis banejojn en la 16a jarcento. En 1835 la banlokon aĉetis greka aŭstro-hungara bienulo, magnato kaj diplomato Georgios Sinas, kiu rekonstruis kaj modernigis ĝin. Lia filo Šimon [ŝimon] konstruigis novajn hotelojn kaj plilarĝigis la anglan parkon. Kaj lia filino Ifigénia konstruigis la turkan bandomon Hammam (esperante: publika banejo) en maŭra stilo.

Hodiaŭ en la banurbeto oni kuracas malsanojn de la mova aparato, statojn post operacioj kaj lezoj, kronikan reŭmatismen, civilizajn kaj profesiajn malsanojn ktp. La banurbeton vizitis ankaŭ la steloj de la kinematografio, kiel Claudia Cardinale, Franco Nero, Gina Lollobrigida, Geraldine Chaplin, Jean-Paul Belmondo, Sophia Loren, Omar Sharif, Ornella Muti kaj aliaj, kiuj postlasis signon de sia mankavo sur la Ponto de la gloro antaŭ hotelo „Flora”.



verkis kaj sendis **Julius Hauser** el Slovakio



>>> du samtajn lud-vagonarojn. Li la tutan tagon kutimis ludi kun la pecoj de la fervojo provante desegni kaj instali diversajn fervojojn, kaj poste rigardi al la irado de la vagonaroj sur ili.

Takatak Takatak Takatak Takatak... Li finis la verkadon de la scenaro. Post la fina frazo li levis la kapon kaj rigardis al la rapide preterpasantaj arbaron, arbojn, vilaĝajn domojn ktp el la fenestro de la trajno. Jes, jes. Li tiun scenaron verkis pere de la flamo inter si kiun rebruligis la filmo “Hugo”. Kaj li mem fariĝus la reĝisoro. Li ne forlasus siajn esperojn estu subpremataj sub la radoj de la vagonaro tiel, kiel tiuj

de Anna Karenina. Li la ĉefrolon donus al sia amatino kun kiu li enamiĝis en sia juneco kaj kiu ŝajnis al aktorino Audrey Hepburn aŭ al la karaktero de Natasha en la filmo “Milito kaj Paco” (War and Peace - 1956).

Li denove ne povis savi sin el amo, fikcio kaj kino.

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**, el Turkujo

"Ne forgesu la akuzativon!"

– Ĉiu Esperantisto, Ĉie, Ĉiam

Ni Esperantistoj ofte parolas pri la akuzativo. Sed la esperanta akuzativo estas nur unu el multaj akuzativoj de mondaj lingvoj. Akuzativo estas montrita iam per kazo, iam per partikulo. Ĉiu akuzativo estas akuzativo sed ne la akuzativo. Nia akuzativo ne estas la sola sed ĝi estas nia.

Lastatempe, dum pluvema tago, mi lernis Tokiponon. Ankaŭ ĝi estas artefarita lingvo kiu uzas akuzativon. Rektaj objektoj estas markitaj per la partikulo "e" staranta antaŭ substantivo.

Multaj lingvoj uzas akuzativon. Ekzemple, akuzativo ekzistas en la keĉua, la hungara, la igba, la finna, la rusa, Sanskrito, la hebrea, la japana, Latino, la germana, la greka, la hindia, la korea, la tamila, la pola, la nubia, kaj multaj aliaj lingvoj.

Malgraŭ tio, ŝajne la tuta mondo malamas la akuzativon de Esperanto.

Ĉiu kritiko de Esperanto, kiujn mi legas, mencias la akuzativon kiel nenecesan aldonon. Ŝajne anonima aŭtoro de unu kritiko en la angla skribis "La akuzativa kazo estas sen dubo unu el la malplej necesaj trajtoj de Esperanto, kaj tial unu el la plej forte kritikataj... la lingvo estus tre pli bona sen ĝi."

Fame, aŭ malfame, la lingvo Ido forigis la akuzativon. La Idistoj pensis pri la problemo kaj decidis, ke vortordo tute sufiĉas por montri distingon inter subjekto kaj objekto. Ido uzas la vortordon SVO, subjekto – verbo – objekto. Per tio, la akuzativo estas senutila kaj forigenda laŭ ili. Tial, ili forigis ĝin.


Tamen, Ido ankoraŭ havas akuzativon. Ĝi simple estas pli-malpli laŭvola. Kiam vortordo ne sufiĉas por klarigi ĉion, oni ja uzas akuzativon por forigi konfuzaĵojn. Idistoj remetis la akuzativon post kiam ili rimarkis ĝian valoron.

Tio estas ofte forgesita preparolante Idon. Ĉu eble ĉar tio povus signifi ke la akuzativo estas utila kaj ne forigenda?

Mi havas etan libron nomitan "Ido, unu jarcenton poste" de André Cherpillod. Ĝi temas pri la historio kaj donas prezenton de Ido. En la prezento de Ido, skribante pri la forlaso de la akuzativo, li ne priskribas la forlason kiel bonan ideon.

Li skribas "Kelkaj personoj, ne sufiĉe pripensinte la aferon, opiniis, ke akuzativo estas senutila komplikaĵo, kiu alportas nenion al la esprimo de la

penso. Ili argumentas, ke ekzemple la lingvoj angla kaj franca malhavas ĝin, kaj tamen funkcias... Sed se ni penos esplori iom pli altan nivelon de lingvo, ni konstatos, ke la lingvoj angla kaj franca (kaj aliaj, kaj ankaŭ Ido) funkcias sen akuzativo, jes, sed je kia prezo!"



André Cherpillod priskribis kvar avantaĝojn de la akuzativo. Ili estas ĝenerale:

1. Ĝi estas pli facila ol vortordo dum lingvolernado
2. Ĝi faras la lingvon fleksebla
3. Ĝi klarigas inter epiteto kaj predikativo. Rimarku la duan, kie ĝi faris tion.
4. Ĝi evitas ambiguaĵojn. Ekzemple, mi traktas vin kiel estro kontraŭ mi traktas vin kiel estron.

Entute, mi konsentas kun li. Malsamaj vortordoj konfuzas min dum lingvolernado. La flekseblon de Esperanto mi ŝatas, ĉar volas vortordon strangan uzi iam mi. La povo klarigi predikativojn faras la lingvon pli bona. Kaj la logika parto de mia cerbo ĉiam ŝatas la eviton de ambiguaĵoj.

Mi ŝatas la akuzativon. Ĉu mi iam faligas la akuzativon? Jes. Sed la akuzativo neniam fizike venos en ĉambron por ataki siajn ne-uzadulojn. Espereble. Ĉu mi pensas ke lingvoj sen akuzativoj estas neuzindaj? Certe ne. Lingvoj estas belaj kaj ilia diferenco estas grava parto de tiu beleco. Ankaŭ la akuzativo, nia akuzativo, estas bela parto de la lingvo.

Kaj la memoj pri ĝi estas tre amuzaj.

verkis **Jason Mey** el Usono

Fonto: <https://priioajn.wordpress.com/2019/02/17/la-akuzativo/>



Stagnanta japana nuklea politiko

La kabineto de la ĉefministro Abe havas jenajn nukleenergipolitikon:

1. Elektro produktata de nuklea energio okupu 20~22 procentojn en la konsisto de la tuta elektro antaŭ la jaro 2030.
2. Eksportu japanajn reaktorojn al eksterlando kiel eble plej multe, ĉar japanaj nukleaj reaktoroj kaj aŭtomobiloj estas la du plej grandaj motoroj por la japana ekonomiprogreso.

Tamen jam estas klare, ke tiu nukleenergipolitiko estas tute ne efektivebla. Hodiaŭ mi skribos pri tiuj aferoj.

Elektro el nuklea energio neniam okupos 20%

Eĉ post la akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, japana ekonomio senprobleme funkciis/as, kvankam tiun tempon la industria mondo minacis la popolanojn, dirante, ke sen elektro el la nuklea energio Japanio ne povos konkuri kontraŭ aliaj landoj pro multekostiĝanta elektro. Luj eĉ diris, ke Japanio revenos al la feŭdisma epoko, se ne estos nuklea energio. Sed tia afero tute ne okazis.

La registaro intencas funkciigi plej multajn reaktorojn. Sekvante ĝian volon, Nuklea Reguligada Aŭtoritato, kies tasko devus esti malfunkciigo de reaktoroj pli ol 40-jaraj, pli kaj pli aprobas refunkciigon de tiuj malnovaj reaktoroj, rezulte nun funkcias 9 reaktoroj. Sed la elektro produktita el ili okupas nur 2 procentojn. 61% de la popolanoj kontraŭas refunkciigon de la reaktoroj (laŭ enketo de la ĵurnalo Asahi en februaro 2018), kaj estos pli kaj pli malfacile por la registaro kontraŭi tiujn voĉojn.

Antaŭ la katastrofa akcidento en Fukuŝima, funkciis 54 reaktoroj, sed jam 24 reaktoroj estas forĵetataj aŭ forĵetotaj, inkludante ĉiujn 10 reaktorojn en Fukuŝima.

Malsukcesa cikligo de nukleaj brulaĵoj

Por cikligi nukleajn brulaĵojn, oni unue ekstraktas plutonion kaj uranion 235 el uzitaj nukleaj brulaĵoj, due faras MOX-brulaĵojn el ili kaj trie uzas tiujn MOX-brulaĵojn en reaktoroj kaj fine, denove oni ekstraktas plutonion kaj uranion 235 el tiuj uzitaj brulaĵoj. Tiamaniere oni povas eterne uzadi nukleajn brulaĵojn. Tiu plano ŝajne estas ideala, ĉar mankas al Japanio minejo de uranio. Oni komencis konstrui fabrikon por tio en la gubernio Aomori (foto) en 1993, sed la tempo

verkis kaj sendis Hori Jasuo el Japanio

de finkonstruado prokrastiĝis jam 20 fojojn kaj oni ne povas antaŭvidi, kiam ĝi estos finkonstruita.

Por tiu cikliga plano de nukleaj brulaĵoj oni jam elspezis 10 000 miliardojn da enoj (100 miliardojn da eŭroj) dum la pasintaj 40 jaroj el la imposto kaj el la elektra pago, nome el la poŝo de la popolanoj.



Japanio jam posedas 47 tunojn da plutonio, el kiuj ĝi povus produkti 6000 atombombojn. La mondo suspektas, ke Japanio havas kaŝitan intencon produkti atombombojn el la plutonio, kaj tian suspekton Japanio devas forviŝi, sed pro malsukceso de tiu cikligo ĝi ne povos malmultigi la kvanton de konservata plutonio. Eĉ se ĝi sukcesos, ĝi ne povos forigi la tutan plutonion, kaj krome dume oni devos uzi danĝeran MOX-brulaĵojn.


En multaj landoj oni jam rezignis tiun cikligon de brulaĵoj, kaj nur Japanio persistas ĉe tio kaj elspezas kvantegon da mono por tiu senutila kaj danĝera projekto. Eble Abe kaj la industria mondo jam komprenas la situacion kaj malfacilon pri tiu projekto, sed ĉar sen tiu recikligo la tuta strukturo de la energioplano disfalus kaj solvi la problemon estas tro malfacile, ili ne havas kuraĝon preni la respondecon sur sin, tial ili ŝajnigas, ke la projekto glate antaŭeniras. Niaj infanoj kaj nepoj devos porti tiun grandan ŝarĝon.

Stagnanta eksportado de japanaj nukleaj reaktoroj

Kiam la ĉefministro Abe lanĉis eksportadon de japanaj reaktoroj kaj poste sukcesis kontrakti pri tio kun kelkaj landoj, li estis certe fiera, sed tiuj kontraktoj estis pli kaj pli nuligitaj kiel jene, kaj nun neniu lando volas konstrui japanajn reaktorojn.

Post la akcidento en Fukuŝima, oni devas pli perfekte gardi la reaktorojn, kaj tio postulas multege

Landoj, kiujn Japanio celis



da mono. Ekzemple en Turkio, komence Micubiŝi kalkulis, ke por la konstruado Turkio bezonos 2,100 miliardojn da enoj (21 miliardojn da eŭroj), sed laŭ la rekalkulo en la lasta julio la kosto saltos al 5,000 miliardoj da enoj (50 miliardoj da eŭroj). Turkio timas, ke ĝi ne profitos en tiu kondiĉo. Ankaŭ Vjetnamio rezignas pro tro alta konstrukosto.

Ankaŭ en Japanio elektraj kompanioj bezonas multege da mono por ripari kaj plifortigi reaktorojn grandskale, tial ili ne povas profiti el malgrandaj reaktoroj, sekve ili rezignas refunkcigi tiujn malgrandajn reaktorojn.

	Lando	Kompanio	Nuna stato
①	Britio	Hitaĉi	Plano de 2 reaktoroj, sed Hitaĉi jam rezignis pro tro multekosta konstrukosto.
		Tooŝiba	Pro granda deficiito en la nukleaj projektoj Tooŝiba retiriĝis de tiu kampo kaj malfondis sian filan kompanion en Britio.
②	Litovio	Hitaĉi	La litovoj rifuzis la konstruadon per referendumo en 2012
③	Turkio	Micubiŝi	Pro altiĝinta konstrukosto la plano estis nuligita.
④	Vjetnamio		En 2016 la vjetnama registaro decidis ne konstrui.
⑤	Tajvano	Hitaĉi, Tooŝiba, Micubiŝi	En 2014 la tajvana registaro decidis ne konstrui
⑥	Usono	Tooŝiba	Westinghouse, la fila kompanio de Tooŝiba en Usono, bankrotis kaj ankaŭ Tooŝiba mem vendis sin al tajvana kompanio.

Forĵeti ĉiujn nukleajn reaktorojn koston multege

Ĉiuj reaktoroj ne eterne laboros, kaj iam ili estos forĵetitaj. Laŭ la kalkulo de la elektraj kompanioj la kosto por tio estos 14,700 miliardoj da enoj (147 miliardoj da eŭroj). Krome, post malkonstruado restos multege da radioaktivaĵoj. Oni ankoraŭ ne scias, kie oni konservos ilin kaj kiom koston por la konservado, do la supra kalkulo estas tro optimisma. Forĵetado de

unu reaktoro daŭros pli ol 50 jaroj kaj baldaŭ en Japanio komenciĝos epoko de forĵetadlaboro en la tuta Japanio.

Miaj timoj

Mi ĉiam timas, ke la elektraj kompanioj ne povos okupiĝi pri tiu forĵetadlaboro en la venontaj 50 jaroj. Mi timas jenajn aferojn:

1. Ĉu la ekonomio de Japanio estos tiom longe prospera por pagi tiom da mono? La monda ekonomio ne ĉiam estos stabila, do Japanio povos fariĝi malriĉa.

2. Ĉu ne okazos milito dum tiuj jaroj? Se okazos milito, tiuj reaktoroj estos tre facilaj celoj por ataki. Eĉ se malamikoj ne atakos ilin, Japanio ne povos zorgi pri tiu forĵetadlaboro.

3. Ĉu ne okazos alia granda tertremo kaj cunamo dum tiuj jaroj. Mi eĉ timas, ke antaŭ la Olimpikoj en 2020 okazos alia kataklismo.

4. Ĉu sufiĉos laboristoj en nukleaj centraloj? Nun Japanio suferas pro manko de laborforto, kaj por kompensi tion, la registaro faris leĝon por faciligi enkondukon de eksterlandanoj en la pasinta jaro, sed laŭleĝe tiuj laboristoj ne rajtas labori en nukleaj centraloj. En la socio, en kiu mankas laboristoj, ĉu daŭre venos multegaj laboristoj al danĝeraj nukleaj centraloj, riskante sian vivon? Eĉ se ili zorgege protektas sin, estas neeviteble por ili elmetiĝi al radioaktiveco.

Tiu kvara problemo estas tre urĝa. Nenie aperas artikoloj pri tio kaj la elektraj kompanioj nenion diras pri tio, sed mi antaŭvidas, ke pro tiu problemo malkonstruado malfruigos aŭ eĉ ĉesiĝos.



La ĉefministro kaj la industria mondo ankoraŭ kroĉas sin al malnova pensmaniero de "Malmultekosto de nuklea energio" kaj ne estas tre pozitiva por enkonduko de recikliga energio. Jam Japanio kuras malrapide kaj laste en la konkuro de enkonduko de recikliga energio, dum aliaj saĝaj landoj direktas sin al la nova vojo.

Je la 21:22 hodiaŭ okazis granda tertremo en la urbo Acuma, Hokajdo, kie okazis pli forta tertremo en septembro 2018. Feliĉe neniu problemo ŝajne okazis, nek akcidento en la nuklea centralo Tomari. Japanio estas tertrema lando. Ie ajn kaj iam ajn okazos

grandega tertremo kaj ĝi povos detrui nukleajn reaktorojn.

verkis **Hori Jasuo** el Japanio

Kampaj Floroj

La ferioj jam estis alproksimiĝantaj sed li sentis sin tre sola kaj sian vivon senkoloran. Li estis instruisto en najbara lernejo sed kvankam li instruis kun amo kaj pasio, li sentis sin fremda al vivo kaj ne havis interilatojn kun la aliaj instruistoj kaj la ekstera mondo. La lernejo kaj lia domo troviĝis en iu distrikto en la rando de la urbo, post kiu la pejzaĝo ŝanĝis al verdaĵoj kaj kampoj. Li vivis sole en malnova domo, kiun li heredis el sia patrino, kaj kiu estis proksime al la lernejo. Lia patrino mortis antaŭ kelkaj jaroj pro longtempa malsano. Lia patro fropasis antaŭ multaj jaroj tuj post kiam li finis la universitaton.



Dum la universitataj jaroj li havis koramikinon, kaj ili amis unu la alian pasie. Li printempe, ĉiu matene piedirante al la universitato kolektis kampajn florojn por regali ilin al ŝi. Sed post la fino de iliaj studoj, finis ankaŭ la bona kaj feliĉa tempo kaj lia koramikino devis foriri al sia hejmurbo, kiu estis en tre fora parto de la lando. Tiel ili disiĝis, kaj poste ili neniam plu vidis unu la alian. Tiam antaŭ pli ol dudek jaroj, la teĥnologio

verkis Vasil Kadifeli el Turkujo

ankoraŭ estis tre malaltnivela, ne estis poŝtelefonoj, oni eĉ ne kutimis havi hejman telefonon, eĉ estis nur unu ŝtata kanalo en la televido. Li provis skribi al ŝi leterojn sed tio ne multe funkciis kaj ilia korespondado ne daŭris tiom longe. Plue mortis lia patro kaj li devis labori por gajni sian panon. Do, en la fino ili perdis unu la alian.



Post tio, en loka trinkejo, li konatiĝis kun virino el la sama distrikto, kaj post iom da tempo ili geedziĝis sed ilia geedziĝo ne daŭris tiom longe. Ili ambaŭ sentis, ke ne tiom multe amis unu la alian kaj eble tiu rilato, por li, estis rimedo por forgesi sian antaŭan koramikinon. Ĉar ili ne havis infanojn, ili kun interkonsento kaj senkvereloj divorciis. Tiam li moviĝis apud sia patrino, kiu jam estis malsana kaj vivis sole, do li zorgis pri ŝi dum kelkaj jaroj ĝis ŝia morto. Post ŝia forpaso li restis tute sola kaj nun li estis kvardek tri jaraĝa. En la lernejo estis aliaj instruistoj sed li neniam provis havi profundan rilatojn kun ili ekster la lernejo, plue ili plejparte estis edziniĝintaj. Kvankam de tempo al tempo venis kelkaj novaj fraŭlinoj, ilia aĝo ne estis taŭga por li kaj krome amafero en la sama lernejo ne estis dezirinda.

La distrikto en kiu li vivis estis tia, ke ĉiu publika servo atingis ĝin laste. Kaj nun, dum la vintro oni fosis ĉiujn stratojn por instalati tubojn de natura gaso kaj la stratoj dum la tuta vintro estis koto-kovritaj kaj la piediro fariĝis tre malfacila por la loĝantoj. Finfine kun la alvenanta printempo finis ankaŭ la laboro sur la stratoj kaj vivo iomete pliboniĝis. Ĉi tiu estis la lasta distrikto de la urbo, kiu ricevis la naturan gason kaj li nun devis apliki por gaskonekto al sia hejmo por almenaŭ profiti el sia suferado dum la vintro.

Iu matene kiam li ne devis instrui, li direktis sin al la nove establita gasoficejo. Estis sunbrila printempa mateno kaj la gasoficejo estis en malnova bela domo proksime la kampoj kaj ĝin ĉirkaŭis bela ĝardeno. Piedirante al la gasoficejo, en la ĝardenoj kaj parkoj jam estis florantaj kampaj floroj kaj en la ĝardeno de la gasoficejo estis lonicera arbusto, kiu pro la frua printempa varma vetero jam floris kaj gajaj floroj plenigis la aeron kun belaodoro. Strange, kvankam li dum tiom longa tempo estis malfeliĉa, nun li iel sentis

sin denove juna kaj ĝojplena.

Li eniris la oficejon kaj demandis al la infromejo kie li devas apliki por la gaskonekto. La viro en la informejo sendis lin al ĉambro ses. Enirante la ĉambron li renkontis blondan virinon, tre belan, tre allogan kaj tre ĉarman. Sur ŝia tablo estis vazo kun multkoloraj kampaj floroj. Ŝajne tiu virino kaj tiuj floroj rememorigis al li lian koramikinon dum la universitataj jaroj. Li alproksimiĝis kaj komencis konversacii. Estis io tre alloga en ŝia voĉo kaj ŝi estis parolanta al li afable kaj ridetante. Li konfuziĝis kaj ne povis koncentriĝi por kompreni kiujn dokumentojn li devis kolekti por la gasaplikado. Finfine ŝi notis ĉion sur papereto kaj donis ĝin al li. Li dankis kaj foriris. Elirante la oficejon frapis lin denove la beleco de la tago kaj la odoro de la loniceraj floroj. Ĉio ŝajnis tre malsame ol la antaŭaj tagoj kaj la kampaj floroj en la ĝardenoj kolorigis lian tagon kaj plenigis lian koron kun ĝojo.



Li revenis al la lernejo kaj instruis, sed li daŭre revis pri la virino en la gasoficejo. Li iel devis konatiĝi kun ŝi ekster la oficejo, koni ŝin, scii kian vivon ŝi vivas, kion ŝi amas, kion ŝi faras kaj koni multajn aliajn detalojn. Post la lernejo li ne volis iri hejmen sed li direktis sin al la kafejo en la centra placo. Je lia surprizo, ŝi, la bela blondulino el la gasoficejo, estis en la kafejo trinkante kafon kaj legante ian revuon. Sur la tablo estis vazeto kun kampaj floroj sed tiuj en ŝia tablo kvazaŭ respegulante ŝian belecon estis la plej belaj en la kafejo.

Li ne sciis kion fari. Lia koro diris, ke li devus alproksimiĝi al ŝi, lia cerbo diris, ke li ne devus ĝeni ŝin. Finfine li decidis paroli al ŝi kaj li iel mensogis, ke li ne komprenis, kiujn dokumentojn li devus kolekti por la gasaplikado. Ŝi tuj rememoris lin kaj tio estis bona signo por li. Li petis permeson sidi kaj li ankaŭ ordonis kafon. Ili iomete babilis pri la dokumentoj, kaj poste iomete pri la bela vetero kaj aliaj negravaj aferoj. Pensante, ke li ne devis sidi tro longe por ne ĝeni ŝin, li petis permeson kaj foriris. Revenante hejmen li estis tute alia viro. Liaj piedoj tute ne sentis sian

korpezon. Li kvazaŭ estisfluganta. Post eble dudek jaroj, ĉi tiu estis la plej bela tago en lia vivo. Tiunokte li ne povis dormi trankvile.

La venontan tagon li instruis senatenteme ĉar dum la tuta tago li pensis pri ŝi. Post la lernejo li kolektis la dokumentojn por la gaskonekto, kaj vespere li vizitis la saman kafejon. Li ŝin trovis denove en la kafejo trinkante kafon kaj legante revuon en la sama tablo. Ŝi estis bela, kiel la kampaj floroj en la vazeto sur ŝia tablo. Li alproksimiĝis al ŝi, salutis kaj montris la dokumentojn. Ŝi rigardis al ili kaj kapjesis. Morgaŭ, ŝi diris, ke ŝi akceptos la dokumentojn kaj komencos la aplikadon. Ili iomete babilis kaj ŝajnis al li, ke ŝi ankaŭ interesiĝis pri li. Sed li denove petis permeson por ke li ne estu tro enuiga al ŝi.

La venontan tagon, dum siaj liberaj instrueroj li reiris al la gasoficejo. La odoro de la loniceraj floroj estis pli densa ol la antaŭa fojo. Li direktis sin al la sesa ĉambro por prezenti la dokumentojn al tiu bela virino, kiu denove ridetis kaj afable parolis al li. Ŝi servis lin kun plezuro, preparis la aplikaĵon por la gaso kaj informis lin, ke la gason oni konektos al lia hejmo ene de du semajnoj. Ĉar li ne havis tempon li revenis al la lernejo, sed li ne povis helpi sin forigi ŝian imagon antaŭ siaj okuloj kaj siajn pensojn pri ŝi el sia cerbo.

Li decidis renkonti ŝin antaŭ la gasoficejo kaj proponi al ŝi ... kion? Li eĉ ne sciis kion diri al ŝi, sed ĉifoje li estis decidema. Li, post la lernejo, tuj iris hejmen kaj ŝanĝis vestojn. Poste li eliris kaj kolektis belajn kampajn florojn el la apudaj ĝardenoj, faris bukedon el ili kaj direktis sin al la gasoficejo. Li decidis atendi ŝin en loko iom fora al la elirejo de la gasoficejo. Kelkaj minutoj poste la bela virino aperis en la elirejo. Vidante ŝin li ekpaŝis unu du paŝojn al ŝi, sed tiam alia viro, alta kaj bela viro, renkontis ŝin ĵus antaŭ la oficejo. Ili brakumis kaj kisis unu la alian ŝajne ili estis bonaj konatoj ekde longa tempo.

La tago malheliĝis, lia koro premiĝis. Li forĵetis la florojn al la stratangulo, turnis sin en la alia direkto, kaj kun pezaj piedoj komencis alpaŝi hejmen. Li sentis grandan senesperon en sia koro dum la tuta vojo hejmen.

La alia viro salutis la belan virinon: "Saluton fratino, kiel vi fartas? Jam estis longa tempo revidi vin. Ĉu vi sentas vin nun pli bone post via divorco?" Ili komencis interparoli kaj piediri al la sama kafejo kun la kampaj floroj en vazetoj sur la tabloj.

verkis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

*** **Unua premio pri rakontoj en la Internacia Literatura Esperanto Konkurso "HRISTO GOROV – HRIMA" 2018, Bulgario** ***

Antaŭ nemultaj tagoj, mi ricevis el Ĉeĥa Respubliko la jenan mesaĝon en Esperanto:



*Saluton,
mi dufoje jare eldonas centpaĝan libreton - LEGAĴOJ - kun sufiĉe mallongaj artikoloj, fabloj kaj eseoj por facila legado. En revuo de Vasil mi trovis vian rakonton, kiu plaĉas al mi kaj mi intencas envicigi ĝin en LEGAĴOJ. Reciproke mi sendas la lastan volumon al vi en aldonajo.
Kun deziro sano kaj ĉio bona
Jindřiška Drahotová, Ĉeĥa respubliko*

Mi klarigas:

Mi publikigis en ĉi tiu blogo, en decembro 2018, la "Etan Kristnaskan rakonton" (<https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2018/12/pequeno-conto-de-natal.html>). Mia amiko Vasil Kadifeli, redaktanto de la simpatia monata revuo "Turka Stelo", faris al mi la ĝentilaĵon reprodukti tiun tekston en sia monata organo (kiu post ĉiu numero

gajnas pli da admirantoj).

S-ino Jindřiška Drahotová, kiun mi ne konis (sed tuj farias bona amikino), tie en Ĉeĥa Respubliko, legis la rakonton en la turka revuo kaj sciigis min, ke ŝi reproduktos ĝin en sia semestra antologio 'Legajoj', de simplaj tekstoj en Esperanto. Detalo: ŝi partoprenas en grupo de handikapitaj Esperantistoj.

Nun, diru al mi: ĉu la mondo de tiuj Esperantistoj ne estas kortuŝe humanisma?

Esperanto, Interreto kaj homa varmo - kia fekunda miksaĵo!

el la blogo de **Paulo Sérgio Viana** el Brazilo

Fonto: [https://](https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2019/03/esperanto-internet-calor-humano.htm)

blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2019/03/esperanto-internet-calor-humano.htm

***** Ni vere dankas por la ĝentileco de kara Paulo Sérgio Viana pro lia permeso publikigi siajn interesajn blogaĵojn en Turka Stelo *****



Mia amo al pola gepatra lingvo

Artikolo de mia plej kora amiko Kazimierz Krzyża. La 21-an de februaro oni festas la tagon de gepatra lingvo. Do mi prezentas tre interesan lian artikolon skribita iam al ĉina redakcio sub titolo:

Mia Amo al pola gepatra lingvo

La mitologia legendo "Babelturo" unuaflanke fariĝis malbeno de nacioj, kaŭzinta grandegan malfacilaĵon en interkomunikado, kio kondukas al diversaj konfliktoj: - miskomprenoj, malkonkordoj, disputoj kaj eĉ militoj. Duaflanke, tiu diferencigo de la lingvoj fariĝis ankaŭ la beno por diferencigi unu nacion de alia, ebliganta al tiu sendependan - specifan kulturalan disvolviĝon en kies rezulto ni havas riĉegan diferencigon de naciaj folkloraj moroj, ritoj, popolartoj, pentroartoj, muziko, literaturo, plasto kaj de aliaj domenoj. Tiu diferencigo de nacikulturaj riĉaĵoj kreas kune kun la riĉegan diversspecan kulturon. En tiu vasta temo eĉ al mi ne specialisto, sed nur laika tre malfacile estas strikte esprimi mian propran opinion, por kio mi anticipe pardonpetas.

Ĉiu lingvo havas esceptan kaj specifan en tiu kazo strukturon, kio atestas pri ĝia multjarcenta tradicio, pri

tradukis Edward Jaśkiewicz el Pollando

homoj kiuj sin priservas far tiu lingvo. Lingvo enhavas ekzaktan bildon de lando, ties kulturo, moro, akiraĵo kaj atingoj. Helpe de la lingvo estas kreita tuta historio de nacio. La gepatra lingvo estas plej forta koherilo de socio diferenciganta unu nacion de alia.

Mi kiel polo fieras pro mia gepatra lingvo, kvankam mi konscias pri komplika gramatiko, pri malfacile esprimebla proverba "ĉinaĵo", kiel la: - chrząszcz brzmi w trzcinie - (skarabo zumas en kano), stół z powyłamywanymi nogami - (tablo kun forrompitaj piedoj), korale koloru kolorowego - (koraloj de koralaj koloro, ktp). Ĝojigas min inter aliaj - pro kio mi tre ofte fieras - ke ĉinoj ekkonis unuan el verkoj de Bolesław Prus "La Faraono" escepte el esperantigo de tiu, kaj same tio, ke ankaŭ alilandanoj ekkonis nian polan epopeon "Sinjoro Tadeo" de Adam Mickiewicz, el E-traduko, plenumita nur surbaze de 5 paĝa, kompleta lernolibro de lingvo internacia - de Ludoviko Zamenhof kun aldonita al ĝi 917 vortradika vortaro.

Tiu tradukaĵo konstante agnoskata estas kiel ĉefverko, ĉar nur en ĝi oni sukcesis konservi rimojn kaj ritmojn de 13 silaba verko, sed treege ĉagrenigas min



tio, ke mia gepatra lingvo estas pli kaj pli malpurigata - fare de ne tro prudentaj homoj - per anglaĵoj. Ĉar multaj butikoj en mia urbo Gdinio kaj en aliaj polaj urboj portas nomojn kaj reklamojn en angla lingvo anstataŭ en gepatra lingvo.

Krom tio ankaŭ polaj kantistoj anstataŭ promocii polan kulturon ege kripligas la anglan lingvon kantante, kio vere ŝajnigas nur anglan.

Mi estas konvinkita, ke ĉinoj havas plimulte da kaŭzoj por fieri pro sia escepte originala, bela, rekte artista lingvo mandarena. La kreaĵo de tiu lingvo estas riĉega kaj grandioza ĉina kulturo videblas el kosmo en formo de ĉina muro.

Ne mirigas min, ke Ĉina Konfucia Instituto akceptis proponon rivali kun Goethe Instituto kaj Franca Centro de Disvastigado de Franca Lingvo kaj Kulturo, ja oni scias, ke la plej multe da homoj parolas ĉinlingve ol en aliaj lingvoj. Multaj malprave konsideras, ke angla jam senrevenue ekregis la mondon. Kiel erara estas tiu vidpunkto - povas atesti jena fakto, kiam oni faris esploron en 6 okcidenteŭropaj landoj, evidentiĝis do, ke nur 7% da loĝantoj komprenis senerare la anglan tekston.

Tre malfacila angla lingvo parolata kaj skribita krom ĝiaj multaj variaĵoj kaŭzas, ke eĉ du personoj interparolantaj la saman lingvon, tute ne komprenas unu la alian. Negativa altrudo de la angla en la koloniaj landoj, kaj same rivalado pri dominado de Hispanio, Francio kaj Germanio, kaŭzas, ke revoj de angloj pri dominado de ilia lingvo restas nur utopio. Maksimume - simile al latina - tiu lingvo povas esti konservita nur en stretaj sciencaj domenoj.

Kiel malĝojan konsekvencon de la lingva dominado oni devas konsideri la senĉesan morton de multaj pli malgrandaj lingvoj kaj kun tio ligitaj iliaj buntkoloraj popolkulturaj artoj. Laŭ UNESKO la malapero de multaj lingvoj minacas al jena kvanto de la lingvoj: en Hindio (196), Usono (102), Indonezio (147), Ĉinio (144), Meksikio (144), Rusio (136). La mortantajn lingvojn oni devus en nomo de konservo de diverssperteco kaj kultura ekvilibro diversmaniere protekti kaj defendi. Mi estas tamen konvinkita, ke saĝa ĉina nacio konscias, ke se la malfacila angla ne estiĝos la lingvo por tutmonda interkomunikado, do des pli ĉina, kiu estas pli malfacila ol la angla. Cetere - kiel mi opinias - la simila popularigo de ĉina lingvo kompare kun angla estus fakte ĝia degrado.

Do nenio miriga, ke Ĉinio kaj Japanio, kiel la solaj landoj de Malproksima Oriento jam ekde apero de Esperanto, tre entuziasme ĝin apogadis. Jam en 1907 jaro ĉinaj anarkistoj en Parizo, por modernigi landon postulis enkondukon de E-o. En 1909 jaro gazeto

"Hengbau" kun fiero anoncis, ke apogas Esperanton. Ankaŭ nuntempe multaj mondaj verkoj tradukata el E-o al ĉina. En multaj ĉinaj lernejoj instruas E-on lektoroj.

Nuntempa situacio en mondo estas pli kaj pli komplikita, do urĝas bezono por enkonduko de E-o kiel la plej facila interkomunikilo al homaro. La mondo, en kiu oni povas libere interkomunikiĝi - certe estus la plej bona mondo. Mi persone tre esperas kaj kredas, ke ĝuste al Ĉinio, kiu havas decidvoĉon de monda potenco, konvenos splendoro kun laŭdo pro efektiva feliĉigo de l' mondohomaro, kiu finfine povos interkomunikiĝi kaj vivi en paco kaj amikeco. La Popola Ĉinio tion tutmeritas kaj tion mi plej kore al ĝi deziras.

verkis **Kazimierz Krzyżak**, el Pollando
esperantigis **Edward Jaśkiewicz**, el Pollando

Nova Jaro

Oni la galerion trapenetru
de l'Nova jaro,
serĉante la ludilojn, kontentigajn
kiel bazaro.



Sed tie oni aŭdas nur ĥaason
kompromitantan
l'esperon tradician, orakolan,
kaj elegantan.

Jam dekomence uragano sputas
nekompreneblajn,
cinikajn, flustrojn, timigante ĉiujn
ĝis la plej feblajn.

Ĵonglu la jaro per la ritma kanto
de l'optimismo,
dum dorse l'voĉ' de l'drako nebuliĝos
pro l'egoismo.

Jam harmonias dum sonora ritmo
l'etosa kredo;
anstataŭ la ĥaos', vigle aperas
jen...florbukedo.

Vivu l'Novjaro! Ĉu revolucia?
Ĉu eksplodema?
Ne gravas kia! Estu ĝi gracia
kaj senproblema.

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Diem Vuong, la reĝo de la Infero, iun tagon malsaniĝis, kiel ĉiu mortemulo. Li tuj sendis altoficulon al la mondo de la vivantoj por venigi iun kuraciston.

Oni devas elekti tiun, kiu havas plej malmulte da mortintoj en sia konsult-registro. - Rekomendis la saĝa monarko.

Kiamaniere tion scii? - demandis la sendito.

Facile! Venigu al mi tiun, kiu havas plej malmulte da koleregaj animoj vagadantaj antaŭ lia domo.

La konsciencia sendito iradis de strato al strato sen trovi la raran bidon. Antaŭ la pordo de ĉiu kuracisto, amaso da animoj lamentis, petante pri repago aŭ vengo. Tial, li urĝe for-kondukis tiun, kiu

havis nur unusolan fantomon antaŭ sia pordo.

Diem Vuong traktis la doktoron kun ĉiuj konsideroj ŝuldataj al ties talento. Li degnis alparoli lin:

Via escepta sukceso devas esti la frukto de longa praktiko. Ĉu jam de longe vi ekzerciĝis en via profesio?

Via Reĝa Moŝto, - respondis la kuracisto, - mi ĵus malfermis mian konsultejon tiun matenon, kaj vi estas mia dua paciento!

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**,

eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/cxampiono/>

Vortareto

bido - ĉiu el la glob- aŭ olivofarmaj pecoj, el ligno, vitro aŭ alia materio, traboritaj per malgranda truo, tiel ke la infanoj povas ilin surfadenigi por ludo aŭ ornamo.

degnis - bonvoli, konsenti fari, sentigante tamen ian moŝtecan komplezon.

fantomo - figuro videbla, sed ne palpebla, kia oni imagis reaperantan mortinton.

moŝto - honoriga ĝenerala kvalifiko por altranguloj, kies rangon oni povas precizigi per la apudmetita adjektivo.

saĝa - kapabla juĝi la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj laŭ tio ĝuste kondukti.

32 >>

finprojoj premis mian gorĝon, tamen mi ne lasos strangoli min, mi fulmrapide stariĝis kaj ekdiris: „Ho, kia diablo!“ Mi ne plu memoras, ĉu esperante, ĉu france, aŭ ĉeĥe.

Antaŭ mi staris malbelaĉa viro kun elrulitaj okuloj kaj malfermita buŝo kun fiaj dentoj. Mi tuj preskaŭ el ĉi tio vomigis. Kaj anstataŭ miaj planoj por dormi en ia hotellito, mi pro sentita naŭzo en mia stomako fordrinkis mian monon en dumnokte malfermitaj kafejoj. Mi pri tio rakontis al triopo el miaj laborkunuloj. Unu el ili pli poste vidante min preparigi al foriro urben, diris al aliaj: „Vidu, tiu Vesely preparis sin por iri rendevui kun la „Demoiselle du Châtelet“ (Fraŭlino Ŝatle). Tiam ni ĉiuj elkore ridis.

En nia plurnacia kolektivo laboris kvaropo da musulmanoj kaj dum ilia ramadano ili estis tre lacaj, ĉiu foje kiam mi povis, mi helpadis al ili dum laborego.

Mi estis plene konvinkita, ke ĉiuj krom tiu ŝtelisto, konsideris min, kiel bonan amikon, eĉ la magazenestro diris, ke mi kondukas kiel Jesuo. Li ankoraŭ eble ne sciis, ke ekzistas iu, kiu nomiĝas H.A.Grouès (abato Pierre). Ĝuste ĉi tiu homo aparteas al tiuj, kiuj malfermis miajn okulojn.

Kiam ni fariĝis malkontentaj kaŭze de niaj salajroj, ni ekkomencis striki, eĉ se la duono el tuta kolektivo ne sekvis nin.

Mi enkuraĝigadis strikantojn dum la tuta semajno kaj post ĝi alvenis decido el nederlanda centro, ke niaj

salajroj estos plialtigataj. Mi ne scias, kion pri mi pensis nia direktoro, vidante min inter strikantoj. Tamen li vidis pli ĝojplenan kaj pli laboreman kolektivon, ol tio estis antaŭe.

lun tagon pensiuliĝis nia maljuna ĉefo. Anstataŭis lin pli juna, tute nekompetenta, tial mi forlasis ĉi tiun fabrikhejmon, en kiu mi pasis 11 monatojn.

**kloŝardo estas persono, kiu propravole forlasas normalan civilizon, vivas en metrooj kaj sub pontoj, celante absolutan liberecon, diference de vagabondoj kaj senhejmuloj, kiujn elpelis mizero.*

Solvo de la krucvortenigmo

O	N	V	N	V	B		O	N	V	T	F
J	O	M	I	Ŝ		O	D	A	E	B	O
E	M	V	S		O	D	R	I	B		H
I	L	I		O	T	R	V	M		O	N
C	U		O	K	S	O	B		O	N	E
K		V	T	R	V	M		O	D	O	M
Ŭ	A	K	R	I	Ĉ		O	R	I	S	V
A	S	O	V	K		O	K	I	R	U	Z



Mia unua laborokupo

-- Origina esperanta rakontado de amiko – SAT-ano kaj mondcivitano Adolfo Veselý

Kiam mi foriris el Emmaüs-centro, mi serĉis laboron.

Dum mia vagado sur la stratoj de Boulogne-Billancourt mi haltis ĉe tiu fabriko kaj eniris. Iu civilvestita viro rimarkis min kaj rigardis min ekde la piedoj ĝis la kapo kaj poste demandis: „Kion vi serĉas, sinjoro?“

Mi estis surprizita, ke iu, al mizeraspekta vagulo, kia mi tiam estis, diras al mi sinjoro. Mi turnis mian kapon malantaŭen, por scii, ĉu iu staras post mi. Vidante neniun, mi hezite respondis: „Mi serĉas laboron.“

Li invitis min en sian oficejon kaj trarigardis miajn paperaĉajn dokumentojn, demandante kie mi loĝas.

„En metroo-vagonaroj, sinjoro,“ mi diris embarasite. Li momente silentis kaj poste diris, ke mi rakontu pri ĉi tio. Do, mi al li esplikis, kial mi estas devigata vivi en tiuj subteraj vagonoj kaŭze de bruligitaj piedoj, kiuj ankoraŭ nun bezonas la varmon. Kaj ankaŭ mi tie akiras la monon. Sed ne per almozpetado.

„Ĉu vi povas al mi diri, kiel tio eblas?“ li diris mirigite.

Kaj sentante, ke li interesiĝas pri mia sorto, mi kontinuus pluparoli.

„Mi sidas sur benkoj de metroo-stacio apud distribuaj aŭtomatoj, en kiuj estas frandaĵoj. Iuj vojaĝantoj enmetas en ilin la monerojn. Se alveturas ilia trajno, certaj homoj – verŝajne ne parizanoj, ĉar nesciantaj ke baldaŭ alveturos alia – tro rapide tiras la aŭtomatan tirkeston kaj ĝi restas blokita. Ili simple ensaltas vagonaron kaj mia mano prenas el aŭtomatflanka kanaletto forgesitan frankon. Vespere ĉe Savarneo estas per 5 frankoj sufiĉe abunda manĝo kaj ankaŭ mi aĉetas vojaĝbileton por uzi pli poste la lastan vagonaron, kiu restas nokte en iu el stacioj kaj en kiu mi povas surplanke dormi ĝis mateno, post kiam ĉiuj personoj eliros kaj enirejoj estas fermitaj.“

Kiam mi finis mian rakontadon, mi konstatis, ke li estas direktoro kaj mi atendis lian reagon. Post la fortrinko de proponita kafo li diris: „Sinjoro Veselý, mi komprenas vian situacion kaj ekde nun sentu vin ĉe ni kiel hejme. Provizore vi povas tranoktadi en la vestejo, sed mi petas, ke vi atentu, se vi fumus ne kaŭzu incendion. Ni premis la manojn kaj la amika dungigo estis finita. Poste li prezentis min al laborkunularo kaj

mi ĉiam post la fino de la labortago uzis la duŝon kaj en vestejo sur malplenaj sako, sur kiuj estis surskribo Eburio, mi kontente dormiĝis. Nian direktoron mi vidadis malofte. Kaj eĉ liajn bonintencajn proponojn mi ne ĉiam akceptis. Iam li venis kaj diris al mi: „Venu kun mi al kakao-muelilo, tie laboras unu alĝeriano kaj mi preferus, ke vi tie laboru per tiu maŝino, vi havos duoble plialtigitan salajron!“

Sed mi tuj rifuzis, dirante al li, ke tiu laboristo laboras diligente kaj zorgas pri siaj infanoj. Tial li bezonas gajni multe pli ol mi, fraŭlo.

En nia kantino estis viraĉo, kiu ĉiumatene preparadis por ni manĝon kaj kakaon, kiun ni ricevadis senpage. Foje okupante per ŝarĝado de kamiono, miaj kunuloj demandis min, ĉu iri matenmanĝi, aŭ prefere ŝarĝigi la varojn. Mi diris, ke ni unue finu la laboron kaj poste matenmanĝos. Sed tiu kantinisto ŝlisis la pordon kaj ne volis nin servi. Neniu el ni iris tion diri al nia direktoro. Mia sola protesto estis simpla: mi demetis mian laborveston kaj duŝis min kaj en pura vestaĵo trairis nian laborejon. Kiam vidis min miaj laborkunuloj, diris al nia grizhara bonkora ĉefo: „Vesely prave foriras kaj vi nenion diras?“

Kaj li respondis: „Kion mi diru al mondcivitano?“ (Ili ĉiuj konsideris min tiu.) Miaj paŝoj kondukis min en kafejon, kie mi ion manĝis kun la kafo kaj fumante unu aŭ du cigaredojn mi aŭskultis per muzik-aŭtomato la rokenrolan, aŭ jazan muzikon. Kutime de Sidney Bechet aŭ de Louis Armstrong. Ĉefe al mi tre plaĉis aŭskulti la „Rock Around The Clock“ de Bill Haley. Post ĉi tiuj agrablaj ripozoj mi trankvile revenis en laborejon. Pro la stulteco de nia kantinisto nia direktoro iel eksciis pri ĉi tio, kaj faris en nia kantino kontrolon. Li trovis, ke tiu fiulo estas ŝtelisto de kuireja oleo kaj de aliaj varoj kaj maldungis lin.

Iun vesperon mi decidis veturi al Parizo por poste tie dormi en hotellito. Ĝojante mi vagadis en la stratoj kaj la vetero estis milda. Iom laciĝinta mi eksidis sur unu ŝtupon ĉe enirejo de metroo Châtelet. Kiam oni fermis ĝin, mi ne plu planis trovi ian hotelon kaj kuŝiĝis kiel antaŭ kelkaj monatoj sur ŝtuparon kaj pensante, ke tio ne gravas, almenaŭ mi ne elspezos la monon. Post ioma duondormo mi eksentis ke iu kuŝiĝas apud mi. Tial mi laŭ kloŝarda* kutimo turniĝis al tiu venulo mian dorson. (Ĉar ĉefe la dorson estas necese ŝirmi por ne malvarmumi). Iom post iom ĝi enmetis sian manon sub mian mantelon kaj tuŝis mian bruston kaj denove ion serĉis. Cetere tie mi monon ne havis kaj post mallonga momento sur mia vango mi sentis kison. Mi tuj pensis, ke tio estas ia ĉarma virino. Sed

